

ZPRÁVY

ĈESKOSLOVENSKEHO ESPERANTSKÉHO VÝBORU INFORMOJ DE ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KOMITATO

Ročník IX Číslo 2-3 (26-27) Osvětový ústav v Praze

Říjen 1967

„Clara pacta — boni amici!”

Laŭ la citita latina proverbo klaraj paktoj faras bonajn amikojn. Kvankam ni ne volas kontrakti pri io ajn kun nia samideanaro, tamen ni deziras meti klaraj kelkajn aferojn, por ke ne ripetiĝu la ĝisnunaj miskomprenoj, riproĉoj kaj eventuala seniluziiĝo.

Multaj niaj esperantistoj riproĉas al Zprávy-Infoj, ke ili publikigadas nacilingvaj protokolfarmajn raportojn kaj agadplanojn eĉ kun numerigitaj alineoj. Onidire tio estas enuiga, spacon rabanta — la legantaro tion ne ŝatas, ĉar ĝi volas ĉefe esperantlingvajn tekstojn.

Sed niaj Zprávy-Infoj nepre devas esti dulingvaj, ĉar ĝuste la riproĉitajn raportojn legas kaj atentosekvas niaj oficialuloj, en la klerigaj institucioj, ja eĉ la superaj instancoj. Ni ne povas atendi, ke ili „pro niaj bluaj okuloj” ellernu Esperanton kaj tial ni devas prezenti al ili kaj pli vasta neesperantista publiko nacilingvajn tekstojn, konvinkigantaj ilin pri niaj seriozeco, agemo, taŭgeco, utila agado por nia socio. Kaj ke tio estas afero tre grava, pruvas la intereso de multaj klerigaj laborantoj, de pluraj redaktoroj, kiuj petis pri alsendo de unu n-ro de Zprávy-Infoj, kvankam ili ne estas esperantistoj. Nia gazeto povas servi ankaŭ kiel taŭga propagandmaterialo.

Krome oni riproĉadas al Zprávy-Infoj, ke ili estas neaktualaj, ke ili publikigas informojn, kiujn oni jam antaŭlonge legis nacilingve. Jes, nacilingve, sed esperantlingve oni povas ilin legi nur en niaj bultenoj resp. gazetoj Esperantaj. Se al iu sufiĉas nur la nacilingvaj sciigoj kaj artikoloj, nur pro tio, ke ili estas aktualaj, kiel eble plej freŝaj, li ne estas esperantisto, sed nur amiko de Esperanto kaj eĉ amiko malbona, erarvaganta; esperantisto-kontraŭ-Esperanta.

Kelkiuj pledas por reprezenta, luksa, ampleksa ilustrita revuo, plena de plej diversaj kaj plej freŝaj informoj, plej variaj artikoloj, por ke ĉiuj, ĉiuj, de komencantoj ĝis la pleje progresintaj trovu la sian, kaj la studemuloj trovu ankaŭ lingvan angulon, paralelajn tekstojn esperant-kaj nacilingvajn por povi komparadi ja eĉ la ĉeĥan kaj slovakajn tradukojn.

Oni konsilas al ni, ke ni enkonduku ŝakrubrikon, porinfanan, filatelistan ktp. rubrikon; novaĵojn ankaŭ el la tutmonda movado k. s. Bone kaj saĝe. Sed — kiu faros ĉion ĉi tion? Ni petis jam kelkajn samideanojn, ke ili gvidu por ni porinfanan rubrikon, sed ĝis nun ili sendis nenion. La samo koncernas ankaŭ la ŝak-rubrikon. Pli facile estas ĉe ni trovi gvidanton por eksterlanda ŝak-rubriko ol por nia propra. Kaj ĉu ni raportadu pri la aktualaj de la eksterlanda movado? Ni tion jam komencis kun s-ano Hršel, sed ni konvinkiĝis, ke tion minacas la sama danĝero de malaktualiĝo, ĉar

Zprávy-Infoj povas aperi nur 4-foje dum la jaro.

Nun, kiam jam kelkaj gazetoj (kaj eĉ la bratislava radio) enkondukis priesperantajn rubrikojn, ekde la sekvanta n-ro ni ne plu aperigados „aktualajn” sciigojn, tralasonte ilin al la menciitaj rubrikoj. Sed ni petas ilin, ke ili ne aperigadu Esperantajn tekstojn, ĉar unue estas kaj estos fuŝaj pro la neeviteblaj-nekorekteblaj preseraroj kaj konfuzos la legantaron, due ili rekte malkonsilas la abonadon de esperantlingva gazeto enlanda. Clara pacta — boni amici! Ĝusta divido de la taskoj!

Oni plendas ankaŭ pro la onidire alta prezo de la abono kaj postulas ĝian malaltigon — almenaŭ por la junularo — ĝis duonprezo. Ni petas la ŝparemulojn pripensi, ke por fremdlingva teksto — do ankaŭ por Esperanto — oni devas alpigi, kaj ke la presejaj prezoj tutmonde plialtiĝis. Kaj ĉion: la presadon, administracion, afrankon, sendadon de honor- kaj propagand-ekzempleroj, ĉion ni devas pagi el niaj esperantistaj poŝoj. Jes, ni devas pruvi, ke ni taŭgas ankaŭ por eldonado de propra gazeto. Kiel vi eble jam scias, ni apenaŭ sukcesis kolekti monon, necesan por la elpago de la 1-a n-ro de Zprávy-Infoj! Por la redakciaj laboroj, por la kontribuajoj, por la fotografajoj, neniu povas ricevadi honorariojn kaj eĉ la pretigado de kliŝoj kostas ankaŭ ion.

Entute mi povas konkludi, ke al multaj el inter ni mankas — por tiei diri — la esperantista patriotismo, kiu la verajn esperantistojn igas oferi, helpadi, kunlaboradi, kontribuadi, konstruadi propramane nian elrevitan Esperantan hejmon. Ni ne postulu reprezentan fasadon, imponan tegmenton, se ni ne kapablas oferi monon por cemento, kalko, brikoj ktp. kaj se ni ne havas paciencon ĝisatendi la elkonstruon de solidaj fundamentoj, muroj, planko kaj plafono.

Klaraj paktoj — bonaj amikoj! Ni mem estas la konstruantoj de niaj gazeto, memstara asocio kaj tuta estonteco! Iz.

NIAJ SUKCESOJ NE BEZONAS TROIGADON!

Pasis jam la tempoj, kiam ni ĉiun sciigon, informeton pri Esperanto en la taga aŭ semajna gazetaro taksis grava sukceso. Plejparton da ili liveris la esperantistoj mem kaj ni estis tre feliĉaj, se oni sukcesis trabatali la aperigon. Ni eĉ konsideris la redaktoron, kiu el propra iniciato skribis ian artikolon, felietonon, nia kvazaŭ-bonfaranto, pensante, ke li nepre estas almenaŭ t. n. silenta esperantisto. Bedaŭrinde poste evidentiĝis, ke li nur hazarde publikigis ion, eltirante ian interesan, unikan, senzacion aferon kaj ekde tiu tempo skribis jam pri multego da aliaj senzacioj.

Nia gazetaro nuntempe jam ofte, ja eĉ regule informadas pri niaj aktivado, aranĝoj, kunvenoj, tutŝtataj renkontiĝoj kaj konferencoj, kun aŭ sen internacia partoprenantaro; pri nia propagand-servo por niaj sciencaj, teknikaj, socialismaj atingoj. Do ni jam ĉesis registradi ilin en niaj esperantlingvaj publikaĵoj, cedante tion al la priesperantaj rubrikoj en Neděle, Smena, en la kulturkalendaretoj de Kulturdomoj en la unuopaj pli grandaj urboj, aperadantaj monate. La dusemajna Neděle havas jam slovakajn kunlaboranton en Bratislava. Pionierske noviny (Pionira Gazeto) en Bratislava aperigis tutan kurson de Esperanto, finante ĝin per vortareto. Svet vedy (La Mondo de Scienco) monata luksa, riĉe ilustrita revuo aperigadas

enketon pri Esperanto kun tre favoraj prijuĝoj. Radio Bratislava enkondukis regulajn sciigojn pri nia agado kaj ekde la unua de januaro promesis enkonduki Esperantan kurson (neparolante pri la sukcesaj prezentado kaj reprizado de la prizamenhofa literatura kompilaĵo de D-rino M. Šatura, kiujn interpretis profesiaj aktoroj frunte kun Meritita Artisto D-ro J. Jamnický).

Do nia afero progresas kontentige, kiel rezulto de niaj serioza aktivado kaj efika, sinofera helpo al industriaj entreprenoj, kulturaj institucioj ktp. ĉe propagando en eksterlando. Tiamaniere ni akiris la daŭrajn respekton kaj inklinon al nia strebado - eĉ de sciencaj institucioj.

Sed ĉiu bona afero havas ankaŭ sian dorsan flankon. Kaj kelkaj redaktoroj, kaj parto de la publiko bezonas — kiel ni aludis pli supre — senzacion, aŭ almenaŭ ion unikan. Ili ne interesiĝas pri niaj „bagatelaĵoj". Por iuj estis senzacio, ke Nacia Artisto, Portanto de la Ordeno de la Respubliko, Akademia Pentristo Martin Benka estas esperantisto; ke en eksterlando kelkaj ŝtatestroj aŭ almenaŭ ministroj estas esperantistoj; ke al UNESCO estis prezentita petskribo favore al Esperanto, en la nomo de pli ol 70 milionoj! Por multaj neesperantistoj estas senzacio ankaŭ tio, ke sanagepatraj fratoj, Julio kaj Jozefo Fekete disirintaj antaŭ 20 jaroj, nun interkompreniĝadas helpe de Esperanto.

La menciitaj „senzacioj" fontas el nia serioza informado. Sed kion diri pri „centoj da Esperanto-kluboj aŭ -rondetoj" nialandaj; pri „dekmiloj da konantoj de Internacia Lingvo", se la redaktoroj venas kun la demando: „Kiom da vi estas"? Informi pri grandiozaj aranĝoj, kiuj poste ne okazas, estas ankaŭ senzacio unuamomenta, sed neserioza kaj povas vekti suspekton kaj malkonfidon ne nur de tre valoraj esperantistoj, sed ankaŭ indignon de niaj favorantoj kaj de la serioza publiko.

Esperanto kaj nia movado ne bezonas „senzaciojn", troigadon, eĉ se tion la parto de la legantaro serĉas kaj postulas. Iz.

LA ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTISTARO PLEJ KORE SALUTAS KAJ GRATULAS LA SOVETAN ESPERANTISTARON! VIVU LA GRANDA OKTOBRO KAJ EFEKTIVIĜU EN NIAJ LABORO KAJ STREBADO!

PŘEHLED ČINNOSTI ČSEV A E-KROUŽKŮ

Rok 1967 je rokem velmi významných mezinárodních i našich celostátních výročí a událostí. Je rokem 50. výročí Velké říjnové socialistické revoluce — 80. výročí vzniku Esperanta — Mezinárodním rokem turist. ruchu — 100. výročí narození nár. umělce Petra Bezruče. Tyto a další světové i domácí výročí a akce dávají velmi dobré podmínky a příležitost k rozvoji esperantského hnutí, k širokému praktickému uplatnění esperanta ve všech oborech společenského života po stránce informační a k usnadnění styku s ostatním světem.

Tento rok by se měl stát také významným mezníkem pro další pokrok čs. esperantského hnutí — vyvrcholením příprav na znovuoostavení samostatné celostátní organizace.

Celková činnost II. Čs. esperantského výboru, jmenovaného MŠK počátkem

roku 1965, byla zaměřena na vytváření podmínek k zajištění tohoto cíle cestou mobilizace všech čs. esperantistů k aktivní, uvědomělé a cílevědomé činnosti — v souladu se záujmy naší socialistické republiky, pro obranu míru ve světě a dorozumění mezi národy.

Mnoho se nám společnou prací podařilo. Aktivita čs. esperantistů v posledních letech podstatně vzrostla. Počet E-kroužků z 95 k počátku roku 1965 se zvýšil k dnešku na 140 s celkovým počtem cca 3600 registrovaných členů. — Vznikly nové odborné sekce ČSEV: je to zejména sekce železničářů, která má již 700 členů; takováto sekce vůbec neexistovala ani za dřívějšího samostatného esperantského svazu; pracuje cílevědomě na reálné základně E-kroužků při ZK ministerstva dopravy. Nová sekce mládeže je naší chloubou a nadějí: v krátké době 2 let rozvinula velkou aktivitu, jejímiž výsledky byly 2 pracovní konference, množství kursů pro mládež, vlastní „Zpravodaj“ a kancelář, navázání mnoha mezinárodních styků a řada cest do zahraničí, které vrcholí letos významnou akcí I. mezinárodního semináře. Letos se ustavily nové sekce učitelů, zdravotníků a techniků. Mimořádných úspěchů docílila naše sekce MEM (mírová), která je v přímém pracovním kontaktu s Čs. výborem obránců míru a dokonce i se Světovou radou míru!

Velkým přínosem pro oživení čs. esperantského hnutí a jeho popularizaci byla v letech 1965 a 1966 podpisová akce UEA pro návrh OSN k zavedení výuky esperanta do škol a k jeho účinnému uplatnění v oficiálních mezinárodních stycích. Díky části našich E-kroužků a hlavně obětavým organizátorům — jednotlivcům přispělo Československo k této akci důstojným podílem. Méně pochopení projevíli naši esperantisté pro vlastní akci OSN — „Roku mezinárodní spolupráce“, kde při spolupráci s veřejnými organizacemi a institucemi bylo možno v praxi ukázat a posílit význam mezinárodního jazyka esperanto.

V minulém roce jsme měli výhodnou příležitost a využili jsme ji k hromadné účasti na 51. světovém kongresu esperanta v Budapešti; kongres navštívilo celkem asi 500 čs. esperantistů — mnozí z nich i staří členové poprvé ve svém životě.

V ediční činnosti se nám podařilo — díky pochopení mnoha E-K. i jednotlivců — zavést esperantskou rubriku ve významném kulturním časopisu MKI Osvětové práci, nyní Neděli. — Čs. vydání časopisu PACO vycházejí v posledních letech jako reprezentační revue 2 X ročně a požívají pro svou vysokou úroveň obsahovou (protiválečnou a kulturní) i grafickou a jazykovou velmi dobrého ocenění. — Přes velké potíže, hlavně pro zpoždování v tiskárně, vydali jsme v letech 1965 a 1966 po 4 číslech našeho tiskového orgánu Zpráv ČSEV s literární přílohou. Na Slovensku vychází péčí E-kroužků v Martině cyklostylovaný věstník Esperanto-Agado. Kromě toho vychází v Bratislavě v Pionýrských novinách pravidelný kurs esperanta a v tiskovém orgánu Slovenského svazu mládeže „Smena“ sobotní esperantská rubrika. V revui Slovenské akademie věd „Svet vedy“ je otiskována vědecká tribuna o významu esperanta. „Smer“ v B. Bystrici uveřejňuje kurs esperanta.

Ve státním nakladatelství Orbis vyšla letos pěkná informační brožurka „Mallonge pri Ĉeĥoslovakio“ (Krátce o ČSSR), která je v prodeji v cizojazyčných prodejnách „Knihy“. V dohledné době vyjde další — turistická ilustrovaná publikace „Invito al Ĉeĥoslovakio“ (pozvání do ČSSR), určená jako premie odběratelům mezinárodního časopisu PACO; část nákladu hodláme zajistit pro domácí knižní trh.

Ve Slovenském pedagogickém nakladatelství je v tisku velký slovník Št. Seemanna.

Mnohé z našich E-kroužků pracovaly v minulém období velmi dobře. Ve spolupráci s ČSEV organizovaly řadu úspěšných, oblastních nebo krajských setkání zpravidla ve spojení s plenárními zasedáními ČSEV. Nejvýznamnější z nich byly Celostátní konference delegátů E-kroužků koncem r. 1965 v Olomouci a 2 pracovní konference sekce mládeže v r. 1966 (Praha a Olomouc). Trvalou a významnou úlohu pro rozvoj čs. esperantského hnutí má tradiční Letní esperantský tábor v Lančově, organizovaný již mnoho let obětavě pracovníky E-klubu Třebíč.

V letošním roce objevila se úplná „záplava“ velkých esperantských akcí. K nejdůležitějším z nich patří Celostátní konference naší sekce železničářů (Praha, 80 úč.), mezinárodní setkání a seminář na téma: esperanto do praxe: Plzeň 1967 (300 úč.), hlavní a veřejná kulturní akce čs. esperantistů Kulturní esperantský festival Opava 1967 (350 úč. včetně zahran. hostí) a I. mezinárodní seminář mladých esperantistů v ČSSR (Borek-Jílové) ve spolupráci naší sekce mládeže s OV ČSM Praha-západ. Oblastní konference esperantistů v Bratislavě (19-20.8.67), Konference sekce mládeže v Dudincích (16-17.9. 67) a Krajské setkání esp-istů v Pardubicích 9-10.12.67).

V souladu s touto činností, která ukazuje na životaschopnost čs. esperantského hnutí, ale hlavně na základě praktických výsledků této činnosti, prokazujících společenskou prospěšnost a význam esperanta v současné době, připravoval ČSEV z pověření MŠK rozsáhlý rozbor stavu E-hnutí v ČSSR a návrhy na novou organizaci, které byly koncem r. 1966 předloženy ministerstvu k projednání. V letošním roce probíhají přípravné práce na návrhu Stanov samostatné organizace. Návrh se nachází v připomínkovém řízení u členů ČSEV a řady zkušených znalců — funkcionářů E-hnutí. Zásadní rozhodnutí můžeme očekávat až po schválení nového zákona o společenských a zájmových organizacích.

Na rozsáhlé a odpovědné činnosti Čs. esperantského výboru při plnění metodických, organizačních, vydavatelských a informačních úkolů podílela se dobrou spoluprací řada E-kroužků i jednotlivých odborníků jazykových, literárních aj., kteří pochopili poslání mezinárodního jazyka esperanto v dnešní společnosti, pracovali s rozhledem, účelně a více-méně samostatně. Za dosažené výsledky vděčíme i porozumění a materiální podpoře orgánů MKI, OO i vedení většiny závodních klubů a některých ostatních kulturních zařízení.

Čs. tisk přináší hodně a vesměs příznivých zpráv z esperantského světa a zájem veřejnosti o esperanto je veliký. Každoročně je pořádáno množství kursů v celé republice; Esperanto se vyučuje i na veřejné Jazykové škole v Praze, a v Bratislavě byl dokonce zřízen první lektorát na filosofické fakultě University Komenského! Také zahraniční esperantské organizace a veřejnost zejména v socialistických zemích hledí s velkým zájmem na vývoj čs. esperantského hnutí.

V poměru k těmto velmi příznivým podmínkám, zájmu veřejnosti a přes uvedené pěkné výsledky — vykazuje však naše činnost jako celku, tj. všech čs. esperantistů, závažné nedostatky hlavně pokud jde o konkrétní, účelnou organizační, ediční a informační práci.

Největší slabinou našeho současného hnutí je nepochopení našich E-kroužků v otázce zajištění odběru našeho tiskového orgánu Zpráv ČSEV. Na konferenci

delegátů všech E-kroužků v Olomouci 1965 bylo přijato doporučení zástupce MŠK — vydávat Zprávy ČSEV jako časopis za předplatné pro všechny zájemce. Bohužel pro nepochopitelné neporozumění nebo snad neschopnost vedení většiny našich E-kroužků nepodařilo se nám ani pro ročník 1966, ani letos získat dostatečný počet odběratelů, takže předplatné nestačí uhradit náklady plánovaných 4 čísel Zpráv. Při tom předplatné na Zprávy má být zároveň počátečním a hlavním zdrojem příjmů pro budoucí samostatnou organizaci!

V důsledku toho je činnost ČSEV vážně narušována a bržděna. Mnohé úkoly letošního pracovního plánu ČSEV nejsou splněny; některé jsou jen rozpracovány, avšak chybí schopní a ochotní spolupracovníci, kteří by se starali o jejich dokončení. — Vážně naše ediční činnost, chybí české učebnice a slovníky, není zajištěna výchova zkušených učitelů, je nedostatek dobrých propagačních a informačních pomůcek.

Řešení administrativy ČSEV v Osvětovém ústavu je těžkopádné a pro velký rozsah se stává nezvladatelné.

Podle výsledků v náboru předplatitelů Zpráv se domníváme, že asi polovina u nás registrovaných E-kroužků vyvíjí nepatrnou, formální činnost. Také některé z našich sekcí a komisí neplní své poslání.

Tyto nedostatky musí ČSEV ve spolupráci s aktivními E-kroužky i všemi ostatními zkušenými a schopnými funkcionáři vyřešit. Hlavní úkoly:

1. Pokračovat v náboru předplatitelů Zpráv ČSEV v E-kroužcích a urychleně hromadně poukazovat předplatné na účet ČSEV.
2. Zajišťovat plnění úkolů edičního plánu.
3. Oživit činnost zaostávajících E-kroužků v jednotl. krajích.

Nyní záleží jen na nás esperantistech — na naší konkrétní a cílevědomé práci i obětavosti — jak se bude rozvíjet v budoucnu naše esperantské hnutí!

Tomáš Balda

LA ĜUSTA SINTENO DE ESPERANTISTOJ

SALUTO AL LA JUNULARA KONFERENCO

(Dudince la 16.-17. 9. 1967).

... Laŭ nia opinio la laboro, kiun la Junulara Sekcio de ĈSEK ĝis nun faris, favore influis la junularajn movadojn ankaŭ en aliaj landoj, pri kio atestas la resonado, venanta el diversaj mondpartoj. Kaj mi povas deklari, ke tiu ĉi fervoro kaj celkonscia aktivado de la Sekcio kaj de kelkaj junularaj grupoj en nia lando — kiel ekz. en Ústí kaj Svitavy — plenigas nin per fiero kaj ĝojo. Ili povus esti modelo por iuj el niaj plenaĝulaj rondetoj. Tion pruvas interalie la du tutŝtataj bonege organizitaj konferencoj, la Internacia Seminario, vico da sukcesplenaj kursoj, efikaj propagandaj kaj informaj kampanjoj kaj la ĉiutaga organiza kaj kleriga aktivado de la sekcia estraro. Apartan atenton meritas ankaŭ la lerta eldonado de Zpravodaj (Informilo), kiun ani povas konsideri fakta ligilo de la adeptoj de la junulara Esperanto-movado

en nia lando.

Mi volas ankaŭ akcenti la fruktodonan kontribuon, kiun nia junulara sekcio alportas per sia vigla laboro al la agado de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, al ĝiaj komisionoj kaj ankaŭ al la redakcio PACO.

Ĉi-okaze mi volas turni vian atenton al kelkaj principoj, havantaj decidan influon al la rezultoj de nia laboro:

Iuj el niaj esperantistoj ne ĉiam klare konscias kiamaniere direkti sian laboron, por ke ĝi estu kiel eble plej efika kaj respondu al la postuloj, kiujn antaŭ nin metas la socio de nia lando kaj la evoluŝtupo, sur kiu troviĝas la Esperanto-movado en la nuna tempo.

Ni sincere deziras, ke nia afero sukcesu, tial ni devas ligi ĝin pli ol ĝis nun al la progresemaĵoj de la nuntempo — al la progresivaj fluoj, kiuj batalas kontraŭ ĉio, kio bremsas la vojon antaŭen, kondukas al militoj kaj kaŭzas malamikecon kaj malpacon inter la homoj kaj nacioj.

Ni esperantistoj, kiel homoj progresemaĵoj, povas — helpe de nia lingvo — grave kontribui al la kreado de internacia amikeco kaj paco. Sed ni ĉiam konsciu, ke la lingvo mem ne estas la unusola universala rimedo, per kiu ni interamikigos la homojn. Ni devas lerni vidi, kie estas la faktaj kialoj de malkonkordoj kaj malpaco: ili ja troviĝas ne nur en la lingva diverseco, sed sur sociaj, klasaj, ideologiaj kaj mondkonceptaj kampoj. Centmilionoj da homoj en la mondo ja parolas unu lingvon (la anglan, araban, hispanan, francan) kaj malgraŭ tio ili vivas en malpaco.

Tamen, Esperanto enhavas apartan spiriton, kiu altiris plejparte noblajn kaj pacamajn homojn, kiuj aspiras veran amikecon kaj kunlaboron. Esperantistoj — la veraj — estas humanistoj, kontraŭstarantaj al ĉiu ajn ekspluatado kaj subpremado. Ili estas kontraŭ agresa kaj humiliga milito, furiozanta en kelkaj partoj de nia terglobo — precipe en Vjetnamio. La aktualaj taskoj, kiuj staras antaŭ niaj celkonsciaj esperantistoj estas: krei fortikan fronton de Esperanto-movadoj en progresemaĵoj landoj; ligi amikajn rilatojn kun progresemaĵoj organizaĵoj kaj unuopuloj en aliaj landoj de la mondo; gajni ĉiujn junajn esperantistojn por kunlaboro en ĉiuspecaj aktivadoj, kiuj kongruas kun la aspiroj de la junularo. Ĝuste en tiaj agadoj manifestiĝas la principoj kaj celoj de Esperanto-movado: en ili manifestiĝas ties forto kaj sekve la fina venko.

Iuj niaj samideanoj, volante prosperigi nian aferon, aktivis nur en la kadro de Esperanto-movado kaj izoliĝas disde la laboroj en aliaj sferoj de nia socia vivo. Ekz. ili evitas la anecon en sociaj organizaĵoj, naciaj komitatoj, sindikatoj, en Kompartio ktp. Tiam sintenon ni konsideras erara. Ĝuste tie oni havas la okazon vekigi interesiĝon pri Esperanto kaj konfidon al ties celo kaj misio. Estas ja tute logika, ke ĝuste en la sino de la socio; ĉie, kie kunvenas homoj, povas serioza kaj celkonscia esperantisto per sia modela sinteno kaj laborkapableco atingi renomon kaj komprenon por Esperanto. Ni devas tion fari ne nur en intereso de Esperanto mem, sed ankaŭ pro nia civitana devo. Ni ja devas konsciiĝi, ke oni ne rajtas arogi al si kompetentecon konstrui novan, pli bonan kaj justan eksteran mondon, se ni ne partoprenas unualoke la konstruadon de nia propra feliĉa hejmo — de nia socialisma patrujo. Ĝuste en tio manifestiĝas la majesta ideo de Esperanto, nome la ideo de internaciismo kaj patriotismo, kiu trapenetrita de la vera Zamenhofa humanismo nepre kondukos la

mondon al paco kaj frateco.

El vidpunkto de la evoluo de la homa socio, Esperanto staras hodiaŭ nur sur la unua ŝtupo. Kaj tial ĝi bezonas aktivajn adeptojn, pretajn dediĉi al ĝi siajn fortojn kaj tempon. Vera esperantisto ne estas tiu, kiu ellernis Esperantan kaj uzas ĝin nur por siaj propraj, individuaj, bezonoj kaj intereso, male: li estas flama heroldo kaj batalanto por ĉiuj tiuj ĉi sublimaj celoj. Li estas senskua komunikanto de la plej progresemaj ideoj de la homaro, interpretanta ilin per la unika universala lingvo — Esperanto.

ADMINISTRACE ZPRÁV ČSEV V MARTINE

Žádáme naše odběratele, aby všechny případné reklamace týkající se zasílání časopisu řídili na adresu:

Administrace Zpráv ČSEV — Olga Krajčová, Kollárova 51, Martin.

ZPRÁVY ČSEV, ročník 1966 jsou (kromě č. 1) rozebrány. Prosíme event. zájemce, aby předplatné na ně (Kčs 12,—) nám již neposílali.

Segregacio de plenaĝuloj

Sub tiu ĉi titolo la franca revuo „Le Nouveau Candide” alportis antaŭ kelka tempo konsideron pri la franca junularo kun sufiĉe skuaj konkludoj. Ĝi komenciĝas jene:

„Ĝi estas nova, multe pli grava kaj profunda fenomeno, ol la klasika „Generacia problemo”. Por multe da junaj homoj — en Francio por la plimulto el 5,200.000 — la plenaĝuloj estas hodiaŭ fremda raso, kiun ili malestimas, evitas, kaj al kiu ili riproĉas nekomprenon. Ĝi estas rasismo, kiu ne rilatas haŭtkoloron nek religion. Tiuj „aliaj”, malamikoj, fremduloj, de kiuj la gejunuloj apartiĝas, havas blankan haŭton, sed nepardoneblajn signojn: sulkojn kaj grizan haron. Ili havas ankaŭ nepardoneblan handikapon: ili naskiĝis jam antaŭ pli ol dudek jaroj. Kaj tial la junularo decidiĝis por segregacio (forapartigo de la grego) de tiu plimultnombra raso — la plenaĝuloj. Memkompreneble tio rilatas ankaŭ la gepatrojn, kiuj ofte estas konsiderataj „la plej fremdaj el tiuj fremduloj”.

La artikolo poste detale analizas la kialojn de tiu ĉi danĝeriga konflikto kaj trovas ilin precipe en la faktoj, ke la „plenaĝuloj” okupas ĉiujn postenojn dezirindajn, kaj plue, ke ili ŝajnigas junecon kaj sekve sin trudas en la ludojn de la junaj. La konsekvencoj de tiu konflikto povas esti teruraj — unu el ili estas tiu, ke la dudekjaruloj, konante la militon nur el la rakontado de la „maljunuloj”, al kiuj ili senpripense malkredas, komencas deziri al si la militon kiel rifuzatan ludon.

Feliĉe en nia lando la rilatoj inter la junularo kaj la plenkreskuloj estas tute aliaj. Tamen certaj signoj de tiu konflikto aperas eĉ en nia movado. En la rondetoj kun plejmulto da „antaŭmilitaj” samideanoj la gejunuloj ne aktiviĝas kaj eĉ ne klopodas aktiviĝi. Male tie, kie elstaras iu agopreta kaj samtempe taŭga junulo, kiel ekzemple en Prago Nikolao Nevan, la junularo ŝate kaj are aliĝas, kreiĝas kristaliga kerno kaj la ideo de Komenio kaj de Zamenhof atingas denove sian bruligan forton,

simile kiel antaŭ 60 jaroj. Kaj la fajro, kiel konate, disvastiĝas de si mem. — Ĉi tie mi plej ŝate finus. Sed mi scias, ke multaj el la „pli frue naskiĝintaj” ne ŝatas aludojn kaj nun diros: „Nu, kaj?” — Do, mi ilin respondos:

Ni helpu al la junularo volonte, kiam ili tion postulos. Ni konsilu al ili amplene kaj senegoisme, sed nur kaj nur tie, kie ili mem demandos. Kaj ĉefe — ne trudu nin en ilian ludon. Fx.

Esperantista geedziĝo. Ges-anoj Marie Venkova kaj Vladimír Kostiha geedziĝis la 21a-n de oktobro ĉi-jara en Ostrava. La anoncletero estis esperantlingva kaj kiel moton uzis jenan poemfragmenton:

"... ekridu, amo, eĉ per larmoj, kiam mi nomon enskribis al nomo, hodiaŭ ni prenis la oran sunon super ni en du niajn ringojn kaj korojn!" Al la juna paro ni esprimas sincerajn bondezirojn!

D-ro J. Jermář

ĈE LA TOMBO DE PETRO BEZRUĈ

Ni esperantistoj honorigas hodiaŭ la tombon de la plej granda silezia poeto Petr Bezruč en la urbo Opava, intime ligita kun la vivo de la poeto; en la urbo, kiun li prikantis kaj kie li deziris trovi ankaŭ la eternan ripozon.

Petr Bezruč, homo, kiu ĉiam evitis honorigon kaj gloron kaj kiu kaais sin en absoluta anonimeco eĉ en la tempo, kiam liaj poemoj famiĝis; homo, pri kiu eĉ liaj plej proksimaj kolegoj ne sciis, ke li estas mondfama poeto — fariĝis per maldika libreto de Sileziaj Kantoj revolucia defendanto de la mortinta silezia gento en tiu ĉi regiono. La poeto, sensignifa poŝtoficisto, vivanta for de la ĉefaj centroj de la ĉefaj kulturo kaj praktika vivo, scipovis en siaj poemoj esprimi la ploron, doloron, ĉagrenon kaj koleron de la gento, vivanta en tiu ĉi nature ĉarma kaj ekonomie riĉa regiono; gento de simplaj ministoj, ŝtallaboristoj kaj kamparanoj, subpremitaj duoble: socie kaj nacie.

Li, nekonata kaj malbone pagita eta oficisto, esprimis sin en poezio kaj versoj ĝis hodiaŭ modernaj, rave allogaj per strangaj melodio kaj ritmo, same rememorigantaj la klasikan ritmon de la latina poezio kiel ankaŭ la dolĉan melodion de la silezia dialekto; per versoj tiel simplaj, ke ili estis kompreneblaj por ĉiu laboristo kaj kamparano, sed per la rafinita simpleco kaj poezia imagino same allogaj por la plej kleraj intelektuloj.

Bezruč, la homojn kaj gloron timanta poeto, fariĝis revolucia poeto, havanta la maloftan feliĉon scipovi kunligi la poezian arton kun la socia kaj nacia bataloj, kaj kiu vidis, ke lia poezio fariĝis stimulo por la nacia kaj socia liberiĝo.

En tiu ĉi lando, kie vivis kaj batalis tri nacioj: la ĉeĥa, pola kaj germana, ĉiam estis kaj estas la deziro pri nacia interkompreniĝo. Tial ankaŭ la verko de Petr Bezruč, kiu bone komprenis, ke sen socia liberiĝo ne povas ekzisti liberiĝo nacia kaj interkompreniĝo internacia, servas al la humanisma kaj homarana idealo de la mondo.

Preskaŭ precize antaŭ 30 jaroj mi parolis kun Petr Bezruč, ofta gasto en nia domo, situanta nur kelkajn dek metrojn disde ĉi tiu tombejo, kiel juna studento, pri la estanteco de la ĉeĥa nacio en Silezio; sur la ĉielo jam komencis aperadi la nigraj nuboj, signalantaj la tragedion de Munkeno. Tiam Petr Bezruč profete deklaris, ke post ebla tragedio venos „Ex oriente lux”, el oriento lumo, kiu solvos por ĉiam la tragedian dialektikon de la nacia kaj socia kvereloj en tiu ĉi regiono. Li havis la feliĉon, ke li povis vidi la plenumiĝon de sia profetaĵo.

Tial ankaŭ ni esperantistoj, profetoj pri estonta nacia interkompreniĝo, kun admiro kaj amo honorigas la nomon de la granda kaj humanisma poeto Bezruč, profeto de la liberiĝo de sia amata silezia popolo.



ROŽNOV p. R. - ĈEĤOSLOVAKIO - INVITAS VIN!

Esperantista Klubo en la fama banloko Poděbrady (Bohemio) ĉiujare okazigas gravajn aranĝojn.

Ĉu la uzo de Esperanto estu enkondukita tutmonde?

Mi ne estas esperantisto; tiun ĉi lingvon lernis nur mia frato ankoraŭ en siaj

studentaj jaroj, tial mi esperas esti objektiva. Kvankam mi neniam lernis Esperanton, mia sinteno al ĝi estas tre varma. Ĝi estas temo, kiu povus interesi antaŭ ĉio niajn altlernejanojn kaj, kompreneble, ankaŭ sciencajn laborantojn.

Tial mi bonvenigas tiun ĉi diskuton kiel utilan. La ĝisnunaj kontribuadoj de D-ro Ján Horecký DrSc, de nacia artisto Martin Benka, de Ing. Ivan Plander, vicdirektoro de la Instituto de teknika cibernetiko de la Slovaka Akademio de sciencoj, kaj ankaŭ la sinesprimo de D-ro Matej Lúčan, komisiito por lernejoj aferoj, kiu ankaŭ kun intereso sekvas la diskuton pri Esperanto, pruvas, ke la problemo de internacia helpa lingvo fariĝis grava precipe ekde tiam, kiam en la mondo evoluigis diversaj sistemoj de moderna perlingva interkomunikado. La problemo de diverslingveco ja estis sentata ankaŭ pli frue, sed oni povis ekzisti ankaŭ sen ĝia solvo; kaj, kompreneble, ekzistis la latina kiel peranta lingvo. Tial ŝajnas al mi, ke la evoluo pli-malpli frue devos konduki al Esperanto aŭ alia, ankoraŭ pli taŭga lingvo en la praktika kaj scienca vivoj — unue ĉe malgrandaj kaj poste ankaŭ ĉe grandaj nacioj. La avantaĝoj de tiu ĉi projekto grandskale superas ĉiujn ĝiajn „malavantaĝojn" aŭ negativajn flankojn, kiujn Esperanto eventuale ankoraŭ havas.

Ni vivas en la epoko de ŝtormeca kultura kaj teknika evoluo en la mondo, sed ĝia eble plej granda obstaklo kiel bremsilo restos la diverslingveco. Sen unueca, praktika kaj laŭeble logika konstruita helplingvo, do tia, kian la moderna vivo nepre postulas, la scienco, tekniko, ja eĉ la socia progreso evoluas malpli rapide kaj la sciencistoj kaj praktikuloj devos ĉe la ekrego de siaj fakoj elspezi ĉiam multe da klopodoj, ja eĉ pro la bezono studi pli ol unu fremdan lingvon. Tio ĉi estas la neevitebla, logika kaj senindulga perspektivo.

Temas do nur pri urĝega demando, kiu estas solvenda: ĉu oni plu klopodegu kaj ĝis kiam, aŭ ĉu estas eble fari radikalan ŝanĝon sur tiu ĉi kampo? Kial do ne utiligi Esperanton, se estas tiel sukcese aplikataj multaj aliaj similaj plibonigaj elpensadoj de moderna perlingva interkomunikado, kiel estas la telefono, la radio, la televido, kaj ĉe venkado de spacaj distancoj la fervojo, la aŭtomobilo, la flugmaŝino ktp., kiuj plirapidigas la interrilatojn inter la homoj? Mi opinias, ke antaŭ tiu ĉi ĉefa celo de la moderna vivo devos pli aŭ malpli frue cedi la ĝisnuna solvo, t. e. la lernado de pluraj naciaj lingvoj, malgraŭ tio, ke ĝi tamen ankoraŭ longe restos neevitebla.

Unu el la direktoj de la nuna evoluo en tiu ĉi demando parolas por la angla lingvo. La angla estas relative facila (sed Esperanto estas dekoble pli facila), tamen ĝiaj elparolo kaj ortografio estas por ni malfacilaj. Ĝi estas disvastigita tra la tuta mondo, tamen oni ne povas helpi sin sen ankaŭ aliaj mondlingvoj, kiel la rusa, germana, franca kaj aliaj. Kaj kvankam la nacioj, parolantaj angle, ĝuas konsiderindan avantaĝon, eĉ ili devas lerni aliajn mondlingvojn. La problemo do estas tutmonda, eĉ se — kiel evidentas — ĝi koncernas ĉefe la malgrandajn naciojn. Sed lasi senage la evoluon favore al la angla estus malĝuste, pri tio samopinias kun ni multaj nacioj, eĉ grandaj. Tial ju pli intensaj estos la rilatoj inter la nacioj kaj ju pli gravaj estos la malfacilaĵoj ĉe interkompreniĝado, des pli urĝa estos la bezono paroli per unueca neŭtrala internacia helplingvo.

La scienca analizo de Esperanto donis ne malbonan rezulton. Malgraŭ tio, ke ĝis nun Esperanto estas relative malmulte uzata en scienco kaj tekniko, tiu helplingvo jam havas grandegan kaj valoran literaturon beletran, tradukitan kaj originalan, kaj

jam nun ĝi tra la tuta mondo faras netakseblajn servojn al tiuj, kiuj ĝin regas. Jam la fakto, ke Esperanto ekzistas jam 80 jarojn, ke tiu ĉi lingvo ne pereis kiel ia modaĵo, sed male, ke la nombro de esperantistoj, ja malrapide, sed senhalte kreskas — jam tio estas pruvaĵo, ke ni povas paroli pri iu epoko, kaj tio ja estas grandsignifa. La kialon mi vidas ankaŭ en tio, ke Esperanto estas praktika, ke ĝi havas ĉiujn atributojn por la moderna vivo, inkluzive de la progresema ideo de reciproka alproksimigo de nacioj. Estas nur domaĝe por la afero, ke tiel ĉe ni, kiel ankaŭ en la cetera mondo oni ne dediĉas al la evoluo de Esperanto sufiĉe da atento kaj ne oferas sufiĉe da rimedoj por ĝia disvastigo, respektive ke ĝi ne estas en konvena formo enkondukata en lernejojn. Precipe sur tiu ĉi kampo estus necese fari radikalajn ŝanĝojn, ja eĉ sen konsidero, ĉu aliaj nacioj faros la saman aŭ ne. Mi estas konvinkita, ke ne temas pri hazardrisko, nome tial, ĉar: la vortaro de Esperanto enhavas pli ol 90 % da vortoj, kiuj estas aŭ internaciaj aŭ komunaj al du aŭ pluraj mondlingvoj kaj la alproprigo de la gramatiko de tiu ĉi lingvo postulas minimuman tempon, proksimume 1-2 horojn. Tion ĉi oni povas nomi perspektivohava. Esperanto transprenas pretajn vortojn kaj sciencajn terminojn el tiuj lingvoj, en kiuj ili estis kreitaj kaj el kiuj ili disvastiĝis en aliajn naciajn lingvojn. Ĉi-rilate, diference de docento Plander, mi havas alian opinion kaj pensas, ke Esperanto havas malfermitan vojon ankaŭ en la sciencon kaj teknikon.

Kiajn realajn disponojn oni povus fari favore al la disvastigo de Esperanto ĉe ni? Estas ja eble organizi kursojn aŭ lektoratojn de Esperanto en ĉiuj alternejoj (simile kiel faris la Filozofia fakultato de la Komenský-universitato en Bratislava). Poste oni povus evoluigi la konojn de tiu ĉi helplingvo en pluraj praktikaj kaj pli poste en specialigitaj rondetoj. Esperanton oni povus utiligi en persona kaj skriba kontakto hejme kaj eksterlande. Altnivelaj rondetoj de alternejanaj-specialistoj ekzistas jam en Bulgario, Jugoslavio, Pollando, Hungario, Sovetunio kaj en aliaj landoj.

Mi ŝatus akcenti ankoraŭ unu aferon: multaj timas novajn ideojn kaj kondamnas ilin, ne komprenas ilin kaj eĉ mokas pri ili. Skeptikeco kaj antaŭjuĝoj estis en la pasinteco akompanantoj de multaj pioniraj ideoj. Iam iuj homoj mokis pri la vapormaŝino, ne kredis, ke la planedoj moviĝas ĉirkaŭ la Tero ktp. Multajn brilajn ideojn la homoj pereigis jam antaŭ ol ili naskiĝis. En pli larĝa rilato tamen unu afero estas certa: la ideo de unu interkompreniga lingvo allogadis la homojn dum jarcentoj kaj allogadas ilin eĉ hodiaŭ, kaj ne nur klerulojn, sed eĉ simplajn uzantojn. Se estos bona vola por tio, Esperanto povos esti ekuzita tra la tuta mondo pli frue ol oni tion supozus. Ĝojiga fakto estas, ke la internacian helplingvon — Esperanton alte taksas jam pluraj akademioj de sciencoj kaj eĉ Unesko, la organizo por scienco, edukado kaj kulturo de la Unuiĝintaj nacioj. Tio ĉi jam estas antaŭsigno, ke ĉi-rilate io estas en preparo kaj ke la mondo staras sur la sojlo de ĝis nun plej granda tutmonda scienca-teknika revolucio, kies lastan grandan malhelpaĵon — la diverslingvecon forigos la unueca internacia helplingvo.

Doc. D-ro Ladislav Košta, CSc
(E1 „Svet vedy" Bratislava, n-ro 6/1967 tradukis V. Gazda)

Společný jazyk za jednu generaci

The Worker Esperantist, 1. 2. 1967, C. 185

Jazyk hraje v obchodním světě důležitou úlohu, jak dokládá tento komentář v časopise Sunday Citizen z listopadu 1966: „Ředitelé bez znalosti jazyků často dostávají a provádějí nesprávná rozhodnutí. Obchodní ředitelé bez jazykové pohotovosti jsou vydáni na milost a nemilost prodejním agentům. Mnoho potenciálních zákazníků má omezené znalosti angličtiny a vždy raději používá své mateřštiny. Jednou ze slabých stránek je nedostatek pisařek s náležitými jazykovými znalostmi. Stroje a zařízení zasílané do zahraničí obsluhují pracovníci, kteří stěží ovládají jiný jazyk než svou mateřštinu. Dny, kdy se strojírenské výrobky mohly spolehlivě prodávat se znalostí angličtiny, jsou již dávno za námi.“

Proto se volá po tom, aby se zavedlo vyučování ruštině, neboť „ta je prý jazykem největšího neprozkoumaného trhu na světě.“

Obchodní svět již neignoruje skutečnost, že angličtina není světovým jazykem, jak se tolik lidí tak dlouho bláhově domnívalo. Navrhují však nesprávné řešení.

Ztráty se však nejeví jen v obchodě, ale na každém úseku mezinárodního života. Je na čase, aby všechny národy přistoupili k zavedení společného neutrálního jazyka, který je pětkrát snadnější než kterýkoliv jazyk národní.

Zaveďme tedy esperanto do škol a problém bude z velké části vyřešen za jednu generaci.

Zaměřme se na činnost v tomto směru: Itálie se staví za povinné vyučování esperantu na školách, a v mnoha zemích včetně Velké Británie se mu na některých školách vyučuje. Připravme své děti pro budoucnost a pomozme vyřešit jazykový problém za jednu generaci.

Co usnadní zavedení esperanta do škol?

Raif Markarian v The Worker Esperantist, č. 185 z 1. února 1967, souhlasí s názorem, že zavedení esperanta do škol bude snadnější, až bude zavedeno do odborných a zájmových organizací. Měli bychom však podporovat ty učitele, kteří zavádějí esperanto do svých škol. Mezi učiteli procházíme přípravným obdobím, kde se podle možností snažíme

1. vyučovat esperantu podle nejlepších moderních metod
2. propracovat esperantské kursy podle nejmodernějších metod v jiných jazycích
3. vytvořit odbornou literaturu
4. nalézt prostředky, jak umožnit stále více kontaktů mezi mladými esperantisty
5. vytvořit informační literaturu pro neesperantisty
6. vydat seznam doporučených knih a jiných pomůcek k použití pro nové učitele esperanta

Jestliže učitelé vyčkávají a nic nepodnikají, nebudou moci včas reagovat na požadavek zavést esperanto do škol.

I když se část žáků, kteří se dnes esperantu učí, pro hnutí ztratí, vykonali alespoň to, že umožnili učitelům zdokonalit se ve vyučování esperantu. Nebuďme příliš

pesimističtí. TEJO a její národní pobočky v poslední době oživilí svou činností. Pouze netečnost celkového hnutí (které nereaguje na výzvy o podporu) omezuje práci dnešní generace esperantské mládeže.

Příspěvek byl reakcí na článek v Tamtamo, č. 45.

Který jazyk pro celý svět?

(IGS/640) Stále častěji slyšíme tvrzení státníků a diplomatů o nadřazenosti některého národního jazyka. „Francie“, prohlásil generál de Gaulle v projevu na generální konferenci UNESCO, „vždy nabízela k použití bohatou žej celému světu a dává světu jazyk výtečně uzpůsobený universálnímu charakteru myšlení“. Je otázkou, zda svět chce tento dar přijmout. William Benton, americký zástupce u UNESCO, tvrdil v předošlém projevu, že „angličtina v dnešní době převzala místo francouzštiny jako hlavní jazyk diplomacie, obchodu a dokonce i ložnice.“ Dodal, že rozšíření angličtiny pomohla „hospodářská i vojenská moc USA“. Mezi tlakem různých velmocenských ambicí se stále více politiků kloní k stanovisku Willy Brandta: Na cestě k mezinárodnímu přátelství a porozumění znamená různost jazyků značnou překážku. Mezinárodní jazyk esperanto již dlouho a úspěšně přispívá k odstranění této překážky.“ Neboť, jak zdůrazňuje 1. článek nové Deklarace o zásadách mezinárodní kulturní spolupráce, která byla na téže generální konferenci UNESCO v Paříži přijata, „každá kultura má svou důstojnost a hodnotu, kterou je nutno ctít a zachovávat.“

Esperanto na polských universitách

IGS/642. Kopernikova universita v Toruni — po universitách v Krakově, Lodži a Glivicích — zavedla lektorát esperanta. Esperanto jako nepovinný předmět bude mít stejné postavení jako španělština, italština a švédština. Dvouleté studium bude zakončeno zkouškou pro učitele. K studiu esperanta se přihlásilo 52 posluchačů.

Esperanto na maďarské universitě.

IGS/639. Tříletý kurs esperanta zahájila katedra obecné lingvistiky Eötvösovy university v Budapešti. V 3. ročníku se vyučuje 6 hodin, týdně. Absolventi budou středoškolský učitelé esperantského jazyka a literatury. Dvě další maďarské university zavedly esperanto v minulých letech.

Jadwiga Paszkiewicz: Ĉu Esperanto — Nebezonata?

IOE-Gazeto 1, 1966 X/XI, č. 4, s. 7

Polská turistka se na cestě Československem nesešla s případem, že by Čedok poskytoval služby i v esperantu. V Karlových Varech již 3 roky nikdo takovou službu nežádal. Úředníci polské cestovní kanceláře Orbis nedostávají za znalost esperanta příplatek. Ani v Inturistu nikdo službu v esperantu nežádá. Je na esperantistech, aby v cizině znalost esperanta neskrývali, ale aby ho používali tak jako jiného cizího jazyka a tím jeho používání žádali od všech institucí cestovního ruchu.



„Esperanto — pordego en la mondon" diras la surkribo super la kunventintoj en Jablonec (norda Bohemio)

Stručná zpráva o 2. plenárnem zasadnutí ČSEV v Opave (7.7.1967)

Prítomní členovia ČSEV: ss. Sviták, Čambál, Balda, Hršel, Hruška, Kočvara, Kucín, Vondroušek (v zast. s. dr. Šikulu) Hostia: ss. Dr. Pumpr, prof. Lukáš, J. Kořínek, dr. L. Izák, dr. Holman za MKI, K. Martan za OÚ Praha, Kuzník a Solnický za EK Opava. V prvej časti bol prítomný s. Gusev z Moskvy.

Zprávu o činnosti ČSEV za I. polrok 1967 predniesol s. inž. Sviták. Zároveň bola i kontrola splnenia úkolov od posl. zasadnutia. Plénium schválilo utvorenie **pracovnej skupiny pri ČSEV pre styky so zahraničím**, ktorá vypracuje plán činnosti s perspektívou do r. 1970.

Na návrh dr. Izáka a na odporúčenie EK Brno plénium poverilo zastupovaním a odovzdaním pozdravu na UKE v Rotterdame s. J. Ambroža.

Zprávu o práci sekcií a komisii podal s. Balda. Po jej schválení plénium schválilo i utvorenie sekcií: technickej, zdravotnickej a učiteľskej (zodpov. vedúci: inž. Werner, s. Ambrož a s. Kraft). Sekcie vypracujú plán činnosti do konca r. 1967 a prípravu na 1968. Plénium súhlasilo s návrhom, aby doterajšia sekcia architektov splynula s novou tvorenou sekciou technickou. Neodporučilo utvoriť osobitnú komisiu pre spoluprácu s IOE — úkoly v tomto smere prevezme pracovná skupina pre styky so zahraničím. — Plénium súhlasilo s utvorením **komisie jazykovej a skúšobnej** miesto doterajšej jazykovej. Vypracovať návrh štruktúry obsahu a foriem práce komisie bol poverený dr. Pumpr. — Vedením a koordináciou práce komisii a sekcií sa poveruje s. Balda.

O spolupráci so spoločenskými organizáciami referovali: ss. Kočvara: so Svázarmom — LET v Lančove, s ČSM (OV ČSM Praha-západ) — medzinár. seminár v Turyni; s podnikmi v Rožnove, Jihlave, Přerove; Liberci; s obcami (Brno — veľtrh), Opava, Jablonec atď.

s. Hruška — o spolupráci s organizáciami, ktoré majú styk so zahranič. inštitúciami a organizáciami (EK v Jablonci im navrhuje vypracovanie prekladov a pod.). Navrhuje usporiadanie Medzinár. priateľstva v rámci akcie „Liberec — Jablonec“.

s. Čambál o spolupráci s Múzeom SNP v B. Bystrici a s Maticou slovenskou v Martine.

s. Balda — o spolupráci s ČVOM, ČSM, so ženskými organizáciami

UZNESENIA:

Plénium ukladá predsedníctvu vyzvať krúžky, aby poslali ČSEV svoje plány činnosti s perspektívou na budúci rok; aby väčšie akcie, ktoré pripravujú, sa mohli koordinovať a predišlo sa nahromadeniu ako tohto leta. Upozorniť ich na potrebu zaradiť plány činnosti do plánu ich osvetového zariadenia (zriaďovateľ'a) a do okresného plánu kultúrnej a osvetovej činnosti. — Odporučiť krúžkom presadiť 1 člena do miestnych, alebo okresných komisií turist. ruchu a do podnikov, ktoré majú styk so zahraničím a pomáhať im (preklady, sprostredkovanie stykov, spolupráca pri vydaní prospektu a i.) — Plénium ukladá všetkým členom výboru rozvinúť ďalší nábor predplatiteľov Zpráv v krajoch; prijíma návrh zriaďovať tlačový fond. — Plénium ďalej schvaľuje zprávu s. Baldu o zasadnutí predsedníctva MEM v Sófii a uznáva sa pomôcť pri usporiadaní týždňa medzinár. priateľstva, plánovanom na rok 1968.

Stručná zpráva o 3. plenárnom zasadnutí ČSEV v Bratislave (19. aug.1967)

Prítomní členovia ČSEV: ss, Čambál, Hršel, Kočvara, inž. Sviták, inž. Fischhof (v zast. s. Kucína). Hostia: ss. dr. Izák (red. Zpráv), P. Rosa, M. Magyar, dr. Havaš, Fr. Šatura (EK Bva), arch. Drlík (EK Praha), I. Mokroš (EK VŽKG), M. Nevan (Sekcia ml.)

Zprávu o činnosti esp. krúžku na Slovensku podal s. Čambál. Zaregistrovaných je 29 krúžkov, z toho v krajoch Západoslov. 5, Stredoslov. 18; Východoslov. 6. Aktívne sú Bratislava, Dudince, Jesenské, Košice, Lipt. Mikuláš, Martin, Piesok, Pieštany, Prievidza, Žilina, Žitavice. Mnohé slabo referujú o svojej činnosti. Neprejavujú aktivitu B. Štiavnica, Jesenské, Krupina, Poprad, Prešov, Šahy, Veľ. Krtíš, Žiar n/Hronom. V Bardejove oba krúžky zrušili.

O činnosti v Bratislave referoval s. P. Rosa: dva krúžky úzko spolupracujú. Nadviazali styky s Výborom obrancov mieru. Preložili vietnamské rozprávky do slovenčiny. Spolupracujú s OÚ v Bve, s Výborom čs. žien, SAV, ČTK a rozhlasom. Pionierske noviny uverejnili esp. kurz a slovníček. „Svet vedy“, časopis SAV, uverejňuje diskusiu o esperante. V Smene na nederu od 10. júna vychádza rubrika o esperante pod vedením J. Lamačku z Trenčína.

Návrh sekcie MEM na usporiadanie „Týždeň medzinár. priateľstva“ 1968 v Plzni, predniesol v zastúpení s. Baldu s. M. Nevan a plénium schválilo s predbežným dátumom 9.-15. 6. 1968.

Plénium sa zaoberalo i prípravou na ustavenie Sväzu a hodnotením tohoročných

akcií (16. LET v Lančove, EKF v Opave, 7. stretnutie esperantistov v Poděbradoch, Stretnutie esp. v Jihlave, 1. Internac. Junul. Esp. Seminario v Borku — Jilovém). Plénium poverilo predsedníctvom vysloviť — prostredníctvom zriaďovateľov — 16 LET Lančov, EKF Ostrava a IJES Borek — Jílové poďakovanie za dobrú a záslužnú prácu.

Esperanto — jazyk pro všechny.

Letos na jaře se v knihkupectvích objevily slovníky mezinárodního jazyka esperanta. Za několik měsíců se jich v Minsku prodalo přes 600. O velkém zájmu o esperanto svědčí četné publikace, které se v tomto jazyku objevily jen za minulý rok. Jsou to výběry básní Puškinových, Lermontovových, Rajnisových, Jesenioových, Šolochovův román Osud člověka aj.

O mezinárodní jazyk esperanta roste zájem na celém světě. V zahraničí vychází kolem 100 časopisů. Rozhlasové stanice mnoha zemí — Polsko, Československo, Maďarsko, Bulharsko, Jugoslávie aj. používají esperanta v pravidelných relacích pro zahraničí. Zvyšuje se počet škol, kde se esperantu vyučuje. Je velmi rozšířen v mezinárodní turistice.

V Minsku se esperantu vyučuje individuálně na některých vysokých a jiných školách a ústavech. Menší esperantisté navázali a udržují přátelské styky s esperantisty v Bulharsku, Maďarsku, NDR, Anglii, Polsku, USA, Francii, Československu, Japonsku, na Novém Zélandě a v jiných zemích. Neaktivnější skupina esperantistů je esperantský klub Minského institutu cizích jazyků. Student tohoto institutu A. Pavljukovec se v srpnu zúčastnil sjezdu mezinárodní esperantské studentské organizace.

B. Čečetko,
aspirant Běloruského
polytechnického institutu

Esperanto v Uzbekistánu

150 osob se zúčastnilo plenární schůze taškentských esperantistů v Domě umělců 12. listopadu 1966.

51. světovém kongresu referoval Petr Poliščuk a Kesar' Koblov, Vladimír Zotov komentoval své barevné diapozitivy z esperantského tábora v Uzbekistánu. Dobrá propagace přivedla na schůzi množství neesperantistů, kterým četné dotazy zodpověděl také s. Kovalevskij, předseda esperantské sekce Domu vědců. Do nového kursu se přihlásilo přes 80 zájemců, především mládeže, takže musely být utvořeny tři nové studijní skupiny. Esperantská komise Uzbecké společnosti přátel a esperantská sekce taškentského Domu vědců uspořádá v Uzbekistánu esperantský tábor pro sovětské a zahraniční esperantisty. (Od dop.)

Mag. Anna Dratwer: **Problemo de denaskaj esperantistoj.**

Nia Ligilo, Tel Aviv, 1967 I/III, č. 23, sl. 10-11

Autorka uvádí příklady, kterými si korigovala počáteční odpor k otázce „esperantistů od narození“: na vývoj mladých lidí (Bulhara, Italů, Dánky) mělo používání mezinárodního jazyka v rodině dobrý vliv. Bratři Minnajovi prohlásili, že

nejlepší dar od rodičů bylo esperanto. V této rodině se esperanto předává již třetí generaci.

Pola Esperanto-Asocio, Rondo ĉe Studio de Belartaj Filmoj, Str. Wysawowa 1, WROCLAW, Pollando volonte ekligos kontakton kun filmistoj el la tuta mondo:

Esperantan literaturon (el la ĉeĥa, slovaká, ĉina, hungara, pola, sovetia kaj vjetnamia produktadoj) vi povas mendi ĉe KNIHA, Štěpánská 42, Praha 1.

PLI SERIOZE . . !

Multo ŝanĝiĝis favore al nia afero en la lastaj 2-3 jaroj. Ni akiris novajn eblecojn labori, kunvenadi, ni akiris la favoron de la preso kaj radio, ja eĉ la eblecon eldoni librojn, broŝurojn kaj prospektojn.

Bedaŭrinde, iam ni estas tre malpaciencaj, ne sufiĉe konsciencplenaj kaj ne sufiĉe prudente profitas la ofte pene atingitajn eblecojn. Ekzemple: iuj elbatalas al si la eblecon eldoni libron aŭ prospekton, sed poste en ia superflua, senbaza rapidemo ili ne sufiĉe zorgas pri la lingva flanko de la teksto, kontentiĝas pri sia propra lingvokono, faras mem la tekston aŭ tradukon — kaj anstataŭ eldoni vere indan publikaĵon ili eldonas neperfektaĵon, misprodukton.

Kompreneble, la rezulto de tia publikaĵo estas dubinda ĉar la plejmulto de homoj malfidas la enhavon de lingve malperfektaĵaj tekstoj; ja iuj eĉ ne (fin)legas ilin.

Ni ne estu tiel facilanimaj kaj ne malŝparu tiel pri la pene akiritaj eblecoj! Ni fiksu al ni altajn celojn, ni ĉiuj klopodu, ke ĉio, kio eliras el niaj manoj, estu altnivela, reprezenta. Ni ĉesu finfine esti feliĉe kontentaj pri ĉio, nur se ĝi estas en Esperanto (senkonsidere pri ties kvalito), sed male — ni estu postulemaj kontraŭ ni men.

Kompreneble, ankaŭ la korektistoj kaj recenzistoj estu severaj kontraŭ la aŭtoroj; ili ne estu nur ĝentilaj kapjesantoj kaj flatantoj, sed seriozaj, konsciaj plibonigantoj, ĉar nur tiel ili vere helpas al la afero, nur per kvalito ni povos akiri renomon antaŭ nia kaj tutmonda publiko.

Ni do kontroligu nian (ofte senbazan kaj troan) memfidon — ni kontroligu la tekstojn de niaj eldonotaĵoj fare de iu sperta samideano; estas ja pli bone, se nur unu homo vidas niajn erarojn kaj diskrete korektas ilin, ol se ilin vidas la tuta publiko kaj ridas pri ni — pri la misrezulto de la publikaĵo eĉ ne parolante.

Kaj ni ĉiuj ne forgesu: Nur la plej bona estas sufiĉe bona — kaj laŭ tio ni agu!

Ve-Ga

Vysoké náklady vícejazyčných konferencí

(IGS 638) Poslední dokumenty z OSN nasvědčují, kolik stojí používání více jazyků v mezinárodních stycích. Např. podle dokumentů A/C.6/L.600 bude mezinárodní konference o právních aspektech mezinárodních smluv stát asi 300 000 dolarů, a to jenom na překlady a tlumočení. Podle dokumentu A/6343 stálo letní zasedání hospodářské a sociální rady OSN r. 1965 „téměř půl milionu dolarů pouze pro překládání“. Je samozřejmé, že takové náklady, podobně jako výdaje za písarské práce, kontrolu a rozmnožování dokumentů, jsou přímo úměrné počtu používaných jazyků. Překlady a tlumočení pouze do jednoho jazyka by znamenalo nesmírnou

úspor. Staĉilo by, aby delegáti získali pasívni znalost dotyĉného jazyka. Nejspravedlivějši a (pro jeho snadnost) i nejhospodárnějši řešení by byl mezinárodní jazyk esperanto.

Teknikistoj, ek al via loko!

La esperantistoj dum jardekoj klopodas akceptigi la lingvon internacian al la homaro. Metodoj, per kiuj ili realigas la celon, estas diversaj, pli kaj malpli konvenaj, sed la progreso, kvankam palpebla, tamen ne estas elstara. Al la vojo ofte irata en pasinteco kaj de la multaj ankaŭ hodiaŭ, ne garantias la baldaŭan atingon de la celo. Estas necese konsekvence agi en du direktoj:

Al publikeco de nia agado, nekonforma al fermita klubismo kaj mistera atmosfero de nia „sankta afero“.

Al praktika uzado de Esperanto ĉie, kie ĝi povas al ni servi. Dume estas malmultaj okazoj, sed estas devo de ĉiu konscia esperantisto helpi larĝigi la ekzistantajn vojetojn kaj trapaŝi la novajn vojojn.

Mi direktas la vortojn al teknikistoj, do al homoj prudentaj kaj realismaj. Kvankam vi partoprenas jam en la vivo de lokaj kluboj kaj rondetoj, estas necese, ke vi uzu vian lingvan scion ankaŭ por via faklaboro. Estas multaj homoj, kiuj lernis, multaj eĉ ellernis Esperanton, kaj ne partoprenas en la movado. Ĉu riproĉi ilin? Sekvu mian sentencon: Se la esperantista movado progresos plu kiel ĝis nun, apenaŭ dum nia vivo ĝi estos akceptita ĝenerale. Mi kuraĝas starigi la hipotezon, ke teknikisto ofte ne havas sian hobion en sfero lingva aŭ sociologia. Se teknikisto ne trovas en esperantista medio aplikeblon de la internacia lingvo por siaj celoj fakaj, kaj se li ne estas tenata de fortaj rilatoj amikaj, li ne bezonas resti inter esperantistoj. Por sia kultura kaj societa vivo li trovas multe pli da ŝancoj pere de sia nacia lingvo, des pli, se la loka grupo ne scias teni sian kulturan nivelon sufiĉe alte. Kaj tio ofte okazas. Tiu homo malutilus al si, malŝparante sian liberan tempon per vizitado de esperantistaj kunvenoj. Plejparto de homoj, malgraŭ tio, ke ili simpatias kun Esperanto kaj estas nepre konvinkitaj pri eksterordinara graveco de enkonduko de lingvo internacia, staras do flanke kaj atendas pasive.

Kompreneble mi ne instigas vin al forlaso de la movado, sed male, mi emfaze invitas vin, teknikistojn ĉeestantajn en la movado, komenci intensan aktivecon sur la kampo de via profesio. La tasko estos malfacila, ĉar la kampo estas neplugita, sed konsciu, ke sole la aplikeblo de Esperanto en la praktiko povas venigi konsiderindan disvolvon de la movado. Nur la aplikeblo povas reteni tiujn, kiuj ne estas komplezaj perdadi tempon ĉe dumkunvenaj sentemaj babiladoj, kaj altiri multajn novajn homojn, konvinkitajn pri bezono de la lingvo internacia, kiujn do estas superflue konvinkadi alie ol per faktoj.

Fare de la ĈSEK la 7 Julio 1967 estis aprobita fondo de la Teknika Sekcio de ĈSEK. La decido pri fondo de la sekcio ligiĝas rekte al samspeca procedo en aliaj landoj kaj al fondo de Teknika Ligo de ISAE. En tiu ĉi internacia organizaĵo estas reprezentitaj teknikistoj-esperantistoj provizore el tiuj ĉi landoj: Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Norvegio, Pollando, Sovetunio, Svedio. Kun ceteraj landoj, resp. landaj Esp. organizaĵoj, oni traktas, ekz. kun Francio, Italio, Nederlando,

Usono k. a. Lastatempe la ekmoviĝo en la teknikista medio promesas al vi ligi kontaktojn kun viaj samfakuloj eksterlande kaj profiti la scipovon de Esperanto. Oni ne promesas miraklojn, sed sistemigon de laboro de unuopuloj, progresadon de laboroj bazaj. Pri detaloj ni informos vin alifoje. Nun ni nur apelacias je ĉiuj rondetoj-kluboj, ke ili anoncu al ni siajn membrojn-teknikistojn aŭ instigu ilin anonci sin mem. Al ĉiu ni sendos enket-folion (aliĝilon). Adreso: Inĝ. Vlastimil Kočvara, TS de ČSEK, Leninova 84, OPAVA.

Por la TS: Inĝ. J. Werner



Esperanto jam enhejmiĝis ankaŭ en la fama okcident-slovakia banurbo Piešťany. Sur la bildo: parto de la ekspozicio.



Ni sincere kondolencas al la fratoj Fekete okaze de la forpaso de ilia amata patro

REKONO AL PILZENO

La unua renkontiĝo de esperantistoj en Pilzeno en la tagoj 2-4. de junio 1967 estis preskaŭ modelo, kiamaniere oni povas tian tre stimulan renkontiĝon organizi. Sur ĉiu paŝo, ekde la bone funkcia informa servo en la profesiaj kontribuoj de la UK RSM ŠKODA, ĉio estis zorge pripensita kaj preparita, tiel ke la 300 ĉeestanoj, de kiuj preskaŭ unu triono estis alilandanoj, troviĝis vere en Esperantujo kaj sekve tre baldaŭ kanfandiĝis. Evoluo kaj nuna signifo de la internacia lingvo (Pechoč, Pilzeno); Mondpaca de Esperanto (A. Pettyn, Pollando); Esperanto en sciencoj (Dro Izák, Martin). Esp. en turismo (D. Bartošík, Prago), Informoj pri ĈSEK (Inĝ. Sviták, Prago); Raportoj pri la agado de la rondetoj (funkciuloj), k. a.

La amuza programo enhavis belajn prezentaĵojn de la UK RSM Škoda, nome kantojn, ĥorojn kaj dancojn naciajn, plejparte ĥodajn, kiuj pro sia movlingvo, ankaŭ internacia, tre bone impresis ĉefe la eksterlandanojn. La vespero havis ankaŭ deklaman parton, pri kiu meritis ĉefe s-anino E. Urbanová. Bedaŭride oni ne povas nomi ĉi tie ĉiujn, kiuj meritis pri la sukceso de la vespero, ĉar ili estis vere tre multaj, tamen almenaŭ estu nomita la kanthoro Smetana kun sia dirigento prof. B. Gselhofer kaj solistoj L. Kotnauerová, Petrů kaj Fleck. Ekskurso okazis k. a. al la bierfarejo, tra kiu la gastojn gvidis du okupitoj, parolantaj flue kaj senerare Esperanotn. Granda surprizo estis por mi, kiam mi demandis unu el ili, kiel longe li jam estas esperantisto: - Eble antaŭ kvin monatoj mi aŭdis, ke okazos tiu ĉi renkontiĝo, do mi eklernis Esperanton por ke mi povu vin gvidi!

Por ne esti riproĉata, ke mi nur laŭdas, mi devas ankaŭ iomete kritiki. La manĝaĵo, en Dvořáková 2, estis tute bona, sed la priservo ne. Kaj due: la konferencgvidanto de la seminario semideano Klement tenis firme la direktilon de la diskutado kaj parolis tute bone, sed liaj kolegoj el la estraro tiom regule kaj obstine malrespektis la dekan regulon de nia lingvo. Ĝi estas belega, kaj oni ĉiam povas ĝin ekregi.

Entute ni povas nur bondeziri al la Pilzena Klubo pro la bonege organizita renkontiĝo, kaj ni deziras ankaŭ al la ceteraj kluboj kaj rondetoj konsulti ĈSEK, por ke ĝi ne konkurencu al la ceteraj kaj ne splitigu la movadon! Fx.

Výzva k soutěži v náboru zpráv ČSEV

Všechny E-kroužky vyzval k soutěži v náboru ZPRAV roč. 1967 za Klub esperantistů v Praze při PKOJF předseda arch. Drlík dne 9. 7. t. r. na EKF v Opavě. Pro příští rok plánuje Klub vybírat předplatné na časopis jako součást členského příspěvku.

K této výzvě se připojuje Kroužek esperantistů při SZK „Sklář“ ve Vsetíně dopisem předsedy A. Berky. Zároveň zvýšil počet předplatitelů ZPRAV roč. 1967 na 40, tj. 100 členů a dostává se v tabulce na 3. místo!

Pořadí:

Počet před-	Dary na	E-kroužek
platitelů	tisk. fond	(místo)

1. Praha - PKOJF	101	(381,-)
2. Brno - PKO	50	
3. Ostrava - VŽKG	36	
4. Mělník	33	
5. České Budějovice	28	167,-
6. Piesok	25	
7. Gottwaldov	21	
8. Jablonec n. N. - KASS	20	
9. Vsetín	20	
10. Martin	19	200,-
11. Třinec	16	4,-
12. Žilina	15	
13. Havlíčkův Brod	14	
14. Opava	13	
15. Třebíč	12	8,-
16. Teplice v č.	12	
17. Modřany	12	10,-
18. Kolín	11	
19. Most	10	
20. Pardubice	10	
21. Tábor	10	
22. Lanškroun	10	
23. Havířov	10	
24. Spiš. Nová Ves	10	
25. Příbor	7	
26. Polička	6	
27. Žamberk	5	
28. Dobříš	5	10,-
29. Bruntál	5	
30. Příbram	5	
31. Lipt. Mikuláš	5	20,-
32. Nový Jičín	4	
33. Hořice - JKP	4	
34. Slavkov	4	10,-
35. Herbortice	4	
36. Poděbrady	3	50,-
37. Přerov - Stroj.	3	
38. Žitavice	2	18,-
39. Zlaté Hory	1	9,-
	581	506,-

Dary jednotlivců na tiskový fond:

1. Jan Mráz, Průhonice Kčs 184,-
2. Arch. Josef Drlík, Praha 100,-
3. Prof. Theodor Kilian, Třebíč 100,-

4. Arthur Bolle, Berlin, NDR 44,-
5. Stanislav Lešinger, Praha 16,-
6. Dr. Tomáš Pumpr, Praha 14,-
7. Marie Faustova, Soběslav 14,-
8. Olga Ungerová, Neratovice 10,-
9. M. Šafránek, Praha 10,-
10. Dr. Lubomír Stejskal, Praha 10,-
11. Olga Zelenská, Praha 9,-
12. Karel Zahradník, Praha 9,-
13. Prof. Ing. Josef Kochman, 9,-
14. Anna Bárochová, Praha 8,-
15. Marie Patolánová, Praha 4,-
16. Šimon Held, Praha 4,-
17. Frant. Welterová, Praha 4,-
18. Ing. Josef Trojan, Praha 4,-
19. Jan Kukačka, Praha 4,-
20. Běla Čálková, Praha 4,-
21. Josef Maryška, Čelákovice 4,-
22. Jiří Jelínek, Třebešice 4,-
23. Jan Kafka, Perštejn n. O. 4,-
24. Ing. Fr. Řiháček, Praha 4,-
25. Jan B. Molnár, Praha 4,-

581,-

Jak vyplývá ze shora uvedeného přehledu, je odběr ZPRAV dosud velmi neuspokojivý - 581 předplatitelů prostřednictvím E-kroužků a dalších 53 přímých předplatitelů, celkem pouze 634 předplatitelů!

O nábor odběratelů se zasloužilo ze 140 E-kroužků registrovaných u ČSEV jen 39 kroužků! Těmto E-kroužkům i všem našim přátelům, kteří přispěli na tiskový fond, vzdáváme tímto úprimný dík za vzácné pochopení pro naši společnou věc. Prosíme vedoucí těch E-kroužků, od nichž došly dary hromadně a nemáme podchycena jména jednotlivých dárců, aby jim tlumočili naše díky na nejbližších členských schůzích.

Zvláštní poděkování patří našemu redaktoru MUDr. L. Izákovi, který kromě své odborné práce nám nabídl navíc, že se vzdá i symbolické odměny za redakci ZPRÁV (á Kčs 300,- za 1 číslo), což představuje včetně loňského dvojčísla Kčs 1800,-!

Od ostatních E-kroužků, které buď z nepochopení věci nebo z liknavosti funkcionářů nesplnily tento prvořadý úkol v zájmu čs. esperantského hnutí (a jsou mezi nimi i E-kroužky z řady krajských měst i jiných míst, které jsou schopny organizovat velké akce a jinak pracují dobře), očekáváme, že dodatečně přece zašlou hromadně předplatné od svých členů na náš účet. ČSEV

II-a INTERNACIA ESPERANTISTA ŜAKTURNIRO EN PODĚBRADY

Plezure ni raportas pri la EŜLI turniro okazinta denove en la bela banurbo Poděbrady. Aranĝis ĝin en la kadro de 7-a Internacia Renkontiĝo, la Esperantista klubo Poděbrady.

Post la lotumado sekvis granda fulmrapida ŝaktturniro, kiun partoprenis 16 ludantoj en du grupoj. La finala grupo konsistis el 8 ludantoj. Venkis s-ro Vagenknecht el Poděbrady.

Lunde komenciĝis la normala turniro. Ĝi realiĝis en du grupetoj po 5 ludantoj. Post kvar tagoj estis konataj la venkintoj de unuopaj grupetoj, eĉ la rezultoj de la ceteraj. Pro bonega ludo ambaŭ venkintoj atingis la saman rezulton, tio estas 4 poentojn el 4 eblaj. Por certigi la tutan vicaron por ĉiuj 10 ludantoj la ludantoj ludis duŝakpartian matĉon. Nur la grupaj venkintoj ludis sian matĉon sendecide. La lotumado destinis la belan vazon al Jozefo Novotný el Děčín kaj la marmoran ŝakemblemon al Gustav Jablečník el Praha. La pluajn lokojn okupis 3. Bochmann (Dresden DDR). 4. Prof. Rybář Poděbrady 5. D-ro Duthilleul (Francio), 6. Bossy (Aix en Provence Francio), 7. Paroulek Poděbrady. 8. Krätschmar (Dresden DDR). 9. Jeřábek Prostějov. 10. Mc Lenann (Britujo). Kvin unuaj ricevis belajn rememoraĵojn.

Kelkaj rimarkoj al la organizado: La fulmturniro estis bone aranĝita. La ĉefa turniro bezonas nepre precizan regularon kaj ludordon jam antaŭ sia komenco. Sed ankaŭ disciplinon flanke de la partoprenantoj. Pri la nivelo de la unuopaj ludantoj estas malfacile skribi, ĉar kelkaj ŝakpartioj ne sufiĉas por valorigi la ludanton. La lingvoscio estis relative malbona, sed ni ja devas esperi, ke dum la sekvontaj turniroj la situacio pliboniĝos.

La 3-a INTERNACIA ESPERANTISTA ŜAKTURNIRO okazos en la kadro de grandaj urbaj festoj okaze de la 60-jara datreveno de la fondiĝo de nia banloko. Do ĝis la revido dum la 3-a IŜE!

POR la KORON GLADI VENU en
PODĚBRADY

Jiří Kořínek konsentas pri nia riproĉo!

„En la decembra n-ro 1966 de Zprávy-Infoj tre plaĉis al mi la artikolo »Ni estis en Budapeŝto«... Ĝi trafas la kernon de la afero. Vere priplorinde nesufiĉa estas la lingva scipovo de plejparto de esperantistoj. Oni povus ilin prefere nomi nur amikoj de Esperanto. Sed tia nura eterna amikeco al la lingvo, sen peno ekmajstri ĝin, rekte malutilas kaj malpropagandas, kaj ni devus ĉiurimede akceladi la perfektigadon de niaj samideanoj. La lingvon, kio estas plej aflikta, ne scipovas kontentige eĉ la eldonantoj de lernolibroj, redaktantoj de E.gazetoj kaj multaj alirilite merithavaj aktivuloj. Ĝis kiam ni ne sukcesos plibonigi la lingvan nivelon ĉe la esperantistaro, ni ne povas pretendi, ke aliaj seriozuloj okupiĝu pri nia afero kiel decus."

ĈU JAM TRO DA ARANĜOJ?

Ĉi-jare okazis jam multaj esperantistaj renkontiĝoj. Ni menciuj tiun en la okcidentbohemia Pilzeno kun eksterlanda partoprenantaro, tiun en la mezslovacia Prievidza, tiun de la sudbohemiaj esperantistoj, tiun en la nordbohemia Jablonec kun plenkunsido de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato; en Poděbrady kun internacia ŝakturniro; la Esperantista Kultur-Festivalo en Opava, ankaŭ kun plenkunsido de ĈSEK. Samtempe kun la Internacia Esperanto-Tendaro en Lančov okazis renkontiĝo en Jihlava kun eksterlanda partoprenantaro. Poste efektiviĝis tutslovacia renkontiĝo en Bratislava kun plenkunsido de ĈSEK kaj fine en la sudslovacia Dudince tutŝtata konferenco de Junulara Sekcio de ĈSEK.

La regionaj renkontiĝoj estas sendube tre gravaj por la revivigo aŭ antaŭenigo de la movado. Sed la regionaj aŭ kelkregionaj renkontiĝoj estas riproĉendaj tiam, kiam ili okazas antaŭ tutŝtata aranĝo. La organizantoj de la lasta nepre ekhavas antaŭtimon pro la — kvankam senintenca, tamen konkurenca — parenca renkontiĝo fortiranta de ili multajn ĉeestontojn aŭ almenaŭ kunlaborantojn. Ĉi-jare ni aŭdis kelkajn plendojn ĉi-rilatajn (kiel ekz. de la Opavanoj, ĉar la aliĝiloj al Esperantista-Kultur-Festivalo en Opava alvenadis nur malrapide kaj malfrue). Multaj esperantistoj komence hezitis, kiujn aranĝojn ili propre partoprenu!

Por la venonta jaro jam nun estas planataj, ja eĉ preparataj pluraj aranĝoj, kelkaj kun preskaŭ la sama aŭ simila programoj. Tuj ekestas la demando: Kiuj organizos, kiuj instruos, kiuj partoprenos, kiuj respondecos pri la enhavo, nivelo, servoj ktp.? Kvazaŭ ni vere havus jam centojn da organizantoj, instruistoj; milojn da partoprenantoj, pagantajn. Sed, kiel ni vidas, multaj Esperanto-rondetoj ekzistas nur surpapere, centoj da esperantistoj estas nur izoluloj, aŭ ne aktivigas en nia movado, ne laboras kaj ne helpas en la rondetoj, ne abonas niajn publikaĵojn. Kaj nur laŭ ĉi tiu mezuro oni povas kalkuli la esperantistajn agantojn.

ĈSEK prave atendas kaj postulas, ke oni nepre antaŭanoncu al ĝi ĉiun planatan aranĝon venontjaren, por ke ĝi povu ilin kunordigi, certigi ilian seriozan enhavon kaj senriproĉan lingvonivelon.

Iz.

SOMERA ESPERANTO-TENDARO 1967 EN LANĈOV.

Jam la 17-an fojon E-klubo en Třebíč helpe de la loka Kulturdomo aranĝis somerajn kursojn de la Internacia Lingvo. En du etapoj po 14 tagoj (ekde la 16-a de julio) pliriĉigis siajn konojn proksimume 260 gekursanoj el 11 nacioj. Kiel kutime, antaŭtagmeze oni instruis en grupoj de A ĝis D kategorioj. La instruado estis finata per kanthoro, dum kiu estis instruataj popularaj melodioj, uzotaj en la rondeta praktiko. Posttagmeze oni povis ne nur studi, sed ankaŭ praktiki plej diversajn sportojn, lerni naĝadon, remadon ktp. aŭ promeni en la belega ĉirkaŭaĵo. La grandega lago senĉese altiradis la atenton de la tendaranoj jam pro la belega vetero, daŭranta dum la tuta monato. Grava estis la kurso D por estantaj instruistoj de la internacia Lingvo. Simile grava estis en ĉiuj kategorioj la responda instruado de la literaturo kaj historio. Komunaj ekskursoj duon- aŭ dutagaj proksimigis al interesuloj la

sudomoraviajn kastelojn Vranov kaj Bítov, sed speciale la neforgeseblajn elfosaĵojn en Mikulčice, devenantajn el la 8-9 jarcentoj, konatajn en la mondo sub la nomo Granda Moravio.

El la tagordo ni citas: veksignalo, matena gimnastiko, lavado — ordigado, matenmanĝo, hiso de la flagoj, preparo por la instruado, 3 instruhoroj, antaŭtagmanĝo, 2 instruhoroj, tagmanĝo, tagmeza ripozo (1-hora), individua studo (2-hora), intermanĝo. Banado, sportludoj ktp., individua studo, vespera ordo, vespermanĝo, libera duonhoru, vespera programo, preparo al la dormo. Okazis ankaŭ aŭtobusaj ekskursoj kaj ambaŭ kursoj finiĝis per ekzamenoj. La ĉeesto de lingve eruditaj eksterlandanoj tre helpis al la perfektigado. Gvidanto de la Tendaro estis Paŭlo Sittauer, pedagogia gvidanto Józefo Vítek, programa gvidanto Drahomír Kočvara.

Esperantlingvan faldprospekton pri la sveda urbo Skövde (= šövde) eldonis kaj senpage dissendadas Fritidsstyrelsen SKÖVDE, Svedio = Aŭtoritato por libertempa prizorgado de la urba publiko.

Conrad Fisher, sekretario de ELNA skribas pri Zprávy, volante havigi al si 1 ekz. de Indekso de Semoj, kiun kompilis Doc. D-ro Šikula en la Botanika Ĝardeno de la Universitato en Brno. Li skribas: „Mi ne estas botanikisto, sed serioze komprenas la gravecon de esperantigo de latinaj nomoj de kreskaĵoj kaj de iliaj eroj... Mi intencas traduki anglan vian sciigon pri la du fratoj, kiuj uzas nian lingvon por interkompreniĝi. Mi estas certa, ke la legantoj de nia Newsletter (Novajletero) kun ĝuo legos pri ilia sperto . . . La poemo de K. Píč pri la uzado de -UJ- estas tre utila!

Parolas Pola Radio — Varsovio. Se vi ĝin aŭskultas, petu senpagan alsendon de la Programo, valida ĝis aprilo 1968. Partoprenadu ankaŭ ĝiajn konkursojn — petu prospekton. Adreso: Radio Varsovio, Esperantaj Elsendoj, Varsovio, Pollando.

El la amaso da salutletero al OKF Opava 67 ni aperigas almenaŭ ĉi-suban:

DEUTSCHER KULTURBUND

BEZIRKSLEITUNG

90 KARL-MARX-STADT

DR.-OTTO-NUSCHKE-STRASSE 6, FERNRUF 35355

Karaj geamikoj, permesu al ni transdoni al vi nome de la Germana Kulturligo korajn salutojn ligitajn kun la deziro, ke via festivalo fariĝu plena sukceso.

Via renkontiĝo estas grava kontribuo al la de la UNESCO proklamita Jaro de la Turismo, ĉar ni nun havas eblecon, konatiĝi kun la vivo kaj verko de Petr Bezruč, kaj ankaŭ sekvi la spurojn de via granda Jan Amos Komenský, kiu interalie ja ankaŭ estis antaŭbatalanto por mondlingvo.

Sed via kultura festivalo estas ankaŭ inda kontribuo al la solenaĵoj en la

kvindeka jaro de la Ruĝa Oktobro kaj en la okdeka jaro de nia Internacia Ligvo Esperanto.

Gratulinda fakto, ke via societo harmonie kunlaboras kun la filatelistoj de via urbo.

Same ankaŭ ni agas en nia regiono Kar-Marx-Stadt. Nia regiona estraro de la Esperanto-amikoj aktive kunlaboras en la vicoj de la Germana Kulturligo, kiu donis al ni solidan bazon por fruktodona laboro, kaj harmonie ni kunlaboras kun la filatelistoj de nia distrikto. Ni ekzemple komune preparas la Nacian Jubilean Poŝtmark-Ekspozicion honore al la kvindeka datreveno de la Granda Socialisma Oktobra Revolucio. Interalie ni organizas ekspozicion pri Esperanto, regionan Esp.-renkontiĝon kaj internacian rendezuon de Esperantistoj-Kolektantoj. Ni esperas povi saluti ankaŭ Esp.-amikojn el Opava en nia urbo.

Ĝis revido!
(Hempel) sekretariino

Tuthinduja Esperanto-Asocio

estis oficiale fondita laŭ iniciato de la rusa esperantisto D-ro A. N. Zubkov, kiu dum kvar jaroj laboras en Hindujo. La Asocio membras nun pli ol 100 anojn. Ĝiaj celoj estas: vastigadi Esperanton tra Hindujo kaj organizi esperantistojn, ligi firmajn kontaktojn kun alilandaj asocioj kaj izoluloj tra la tuta mondo kaj kun UEA por aktive partoprenadi en ĉiuj ĝiaj agadoj. Eldonadi propran organon. -

„Estos al ni tre agrable, se vi povus saluti nin kaj sendi al ni iajn Esperantajojn." (Laŭ la letero de D-ro T. N. Singh, ĝenerala sekretario de T. E. A. Adreso: Post Box 52, LUCKNOW, U. P., India (Hindujo).

LA 9-A BALTLANDA ESPERANTO- TENDARO EN VILNIUS

okazis la 1-10-an de aŭgusto 1967 en la ĉefurbo de Litovio. Partoprenis 97 eksterlandaj gastoj kaj entute 428 ĉeestantoj plejparte el la baltamaraj respublikoj (Litovio, Latvio kaj Estonio), sed ankaŭ el tiel malproksimaj landoj kiel Uzbekio, Kartvelio, Siberio. El Pollando venis 10, el Bulgario 6, el Jugoslavio 4, el GDR 2, el Finnlando 1, la ceteraj (proks. 60) el la hungara urbo Debrecen — kun tre altnivela programo de hungaraj dancoj kaj kantoj. —

La kunvenoj okazis en unu el la plej bonaj kaj plej belaj kulturpalacoj, nome en tiu de Profesiaj Unuiĝoj (Sindikatoj). En la Somera Universitato estis prezentitaj 28 prelegoj, plejparte laŭ esperantologiaj temoj. Ĉiuvespere okazis arta programo laŭ apartaj nacioj de Sovetunio. — La tendaranoj loĝis en moderna studenta hejmo, en tre bela parto de la urbo apud monteta kaj arbara tereno, kie ne mankis ankaŭ veraj tendoj de la junaj partoprenintoj.

La loka gazetaro kaj radio tre ofte kaj tre favore raportis pri la tendaro, kiun oni titolis „Forumo de Esperantistoj". Informiĝis ankaŭ TASS telegrama agentejo de Sovetunio.

Ni esperas, ke la komencita sukcesa agado daŭros kaj ke en la tradiciaj ĉiujaraj baltlandaj Esperanto-tendaroj konstante partoprenos eksterlandaj gastoj. La 10-a BET okazos venontjare el Latvio.

(Laŭ la letero de Doc. A. Vaitilavičius al amikoj en ĈSSR).

Japanaj gelernantoj 15-18-jaraj deziras korespodadi kaj interŝanĝi sonbendojn, desegnaĵojn, fotojn, gazetojn k. s. La adreso de la lernejo estas: Esperanto-klubo de Oojáma Kooko, Komone 5-18-I, Itabasi, TOKIO, Japanio.

Japana instruisto S-ro Fusacugu Kido (32-jara): Higasi Mukojima, 3-16-4, Sumida, TOKIO, Japanio, dez. kor. kun geinstruistoj pri diversaj temoj de edukado (ne nur Esperanta).

27-jara bulgaro, fraŭlo Jordan Nikolov, (adr.: Momina Klisura, distr. Pazarĝik, Bulgario) dez. kor. kun seriozaj geesperantistoj laborantaj en fabrikoj kaj esplorlaborejoj pri erclavado de kupropirito kaj plumbozinko.

28-jara polo Stanislav Szkop, Skrytka poczt. 221, JELENIA GÓRA 1 Pollando. Li interesiĝas pri jogo (yoga), psikologio. Li kolektas bildkartojn kaj revuojn esperantlingvajn.

Petu prospekton pri la finna urbo Turku! Ĝi estas la unua esperantlingva, eldonita en Finnlando, malmulte konata norda turisma lando. Adreso: Kaupungin Matkalailutoimisto. Linnankatu 8. TURKU, Finnlando.

IV-A INTERACIA PEDAGOGIA ESPERANTO-SEMINARIO 1967 EN SZEGED.

La rapida kresko de la Esperanto-movado en Hungario post la 51-a UKE en Budapeŝto kaŭzis, ke ni denove post unu jaro vojaĝis suden. Ni partoprenis en Szeged la IV-an Internacian pedagogian E.-seminaron, ĉefe por plibonigi nian Esperanton! Per aŭtobuso ni vojaĝis el Banská Bystrica al Budapeŝto, kaj poste ni daŭrigis la vojaĝon per rapidvagonaro al Szeged. Tie en la stacidomo jam atendis nin niaj geamikoj Lenke Kún kaj Jozefo Mauksinszky, kiu antaŭ unu semajno vizitis nin en Piesok. En la fervojista internulejo jam amasiĝis multaj seminarianoj kaj poste sekvis la interkonatiĝo. El ĉirkaŭ 350 partoprenintoj de la seminario la plej multaj estis kompreneble hungaroj, kaj poste poloj. El Ĉeĥoslovakio mi konatiĝis tie kun gesamideanoj Rýznarová kaj Bartošová el Svitavy, D-ro Chovan el Piešťany, Ferko el Košice, Búcsi el Kvetná kaj Bujas el Frýdek.

La seminario donis al mi ankaŭ respondon al la demando, kial Esperanto tiel rapide progresas en Hungario! Laŭ profesio multaj hungaraj partoprenintoj estis pedagogoj, kiuj post sukcesa studado instruas la internacian lingvon en lernejoj en ĉiuj partoj de la lando. Krome la hungaraj esperantistoj havas neelĉerpeblajn provizojn de altkvalitaj lernolibroj (D-ro Szerdahelyi, J. Baghy), kiuj aperadas preskaŭ ĉiujare en grandaj eldonkvantoj, same kiel la vortaroj de Pechan.

Kiam la seminario finiĝis; pli ol 140 ĉeestantoj faris sukcesajn ekzamenojn (A, B, C). Ankaŭ la partopreno en la Liberaeraj Ludoj (Don Carlos, Ciganbarono) donis al ĉiuj partoprenantoj tre belajn travivaĵojn.

Por sekvontaj seminarioj estas necese limigi la nombron de partoprenantoj, ĉar ne estas eble plenigi la ĉambrojn per pli ol 25 da loĝantoj, kiuj volas kaj devas serioze studi kaj prepariĝi al ekzamenoj! Ankaŭ granda domaĝo por ni estis, ke pro teknikaj kialoj ne okazis la amoncita ŝipekskurso sur la rivero Tisza.

Estas nia devo esprimi sinceran dankon al ĉiuj, kiuj preparis por ni la ĉijaran seminarion, kaj por mi mem estis ĝuo aŭskulti la eminentajn prelegojn de D-ro Szerdahelyi el Budapeŝto.

(D-ro Nekuda)

JAPANA ANONCETO ĈIAM VALIDA!

Se vi volas korespondi kun japanaj esperantistoj kaj ankoraŭ ne havas adreson, skribu al Japana Esperanta Koresponda Servo ĉe KLEG, Nakatuhadori 3-10, Ooyodo-ku, OOSAKA Japanio. Via adreso estu skribita preslitere. Vi baldaŭ ricevos la deziratan leteron. Por ricevi la adreson de ni, sendu respondkuponon.

Korekto de pres-eraro.

S-ano Cibur atentigas nin, ke en la artikolo „Pluaj etaj glosoj el la 51-a UKE" (23-24 n-roj pasintjaraj, pĝ 21) en la gloso „Itala samideano" anstataŭ „ensemblo" devas stari „emblemo". Ni petas pardonon!

Red.

EL NIAJ RONDETOJ

MODŘANY.

S-anino Jana Cířhová — honora membrino!

Esperantista Klubo en Modřany apud Prago ankaŭ ĉi-jare aranĝis kultur-vesperon okaze de Internacia Festotago de Virinoj kaj semestrofino de la Esperanto-kursoj, kiujn la Klubo aranĝis dum instruaro 1966-67. La vespero okazis marde la 14-an de marto en la Urba Biblioteko kun partopreno de gastoj, membrinoj de Virina Komisiono de ĈSEK.

La programon malfermis la prezidanto s-ano Quido Růcker. Poste deklamis Jarmila Havlíková la poemon „Al Virina Tago 1967" de Milda Jakubcová.

La ĉefa programero de la vespero estis la interesa rakontado de s-anino Jana Cířhová pri sia propagand-vojaĝo tra Francio. Ĉiuj ĉeestantoj ĝojis, ke Esperanto denove pruvis sian taŭgecon por interkompreniĝo inter diverslingvaj nacioj.

La sukceso de J. Cířhová estis kronita per la entuziasma propono de s-ano Zedník, ke ŝi estu nomita „honora membrino de Esperantista Klubo en Modřany" pro siaj meritoj pri Esperanto kaj pro la ĝisnuna helpo al nia klubo. La propono estis unuanime akceptita.

Poste prelegis s-anino Křenková, membrino de la sama Sekcio pri avangarda batalo por la mondpaco, kiun proklamis kaj gvidis la heroo virino Berta Suttner.

Por fermi la sukcesan vesperon la prezidanto dankis al ĉiuj prelegintoj kaj al la klubaninoj Sonjo Zedníková, Anna Ŝedá, Jarmila Havlíková, Antonie Vojtová kaj Libuše Pavlíková pro ilia merito pri instruado de Internacia Lingvo kaj pri subtenado de Esperanto-movado.

La 21-an de marto okazis Esperantaj ekzamenoj por finstudintoj de 3 kursoj en Modřany. Ekzamenis kaj la rezultojn notis s-ano Inĝ. Ed. Felix el Prago, kiu jam dum

du jaroj afable protektas nian klubon. La Klubanoj kaj instruistoj sincere dankas al li pro lia entuziasma helpo.

E-rondeto de Laborantoj de Minejo de Venka Februaro en Poruba, okazigis la 23-an de oktobro Vesperon de Julio Baghy. Prelegis kaj recitis la rondetanoj.

Jihlava. Ekde la 16-a ĝis la 19-a de julio 1967, en la jaro, proklamita de UNESCO kiel jaro de internacia turismo, okazis Internacia Amika Renkontiĝo. La partoprenintoj, inter kiuj estis ankaŭ eksterlandanoj, faris kelkajn aŭtobusajn ekskursojn (en la urbeton Třešť por viziti la internacian fotoekspozicion kiel unuan mondan prezentadon, la vaste konatan fabelan urbeton „Blanka Telč" kun belega kastelo; plue al la kastelo Vranov, valbaraĵo Vranov kaj fine en Someran Esperantistan Tendaron en Lančov).

ESPERANTO EN ŽEHUŠICE

En aprilo ĉi-jara, en la junpionira grupo de Baza 9-jara Lernejo en Žehušice (distr. Kutná Hora), fondiĝis Esperanto-rondeto. Ĝi havas 16 membrojn (11-14 jarajn gejunulojn); ĉiuj komencis fervore lerni la lingvon sub gvido de instruisto Lad. Cibur. Post kelkaj lecionoj kelkiuj jam kuraĝis korespondi kun Esperantaj samaĝuloj en Sovetunio, Pollando, Bulgario, GDR, Hungario kaj Britio.

La rondeto kontaktas kun Esperanto-grupo de gelernantoj en Hódmezővásárhely en Hungario. Al la Internacia Ekspozicio de Infandesegnaĵoj en la pola Gdańsk ili sendis verkojn siajn kaj de siaj samlernejanoj. Ili aranĝis ekspozicion de desegnaĵoj de lernantoj el la angla urbo Charley kaj reciproke sendis al la tieaj amikoj la kolekton de siaj samlernejanoj. La rondeto aranĝis prezenton de esperantlingva filmo „Renkontiĝo kun Fiat", pere de murgazeto la lernantojn konatigis kun personeco de Fr. Vlad. Lorenc, aŭtoro de la unua Esperanta Lernolibro por ĉeĥoj, kiu naskiĝis en la proksima vilajo Zbyslav. Dum lernado oni uzas vortaretojn kaj multobligitajn tekstojn de la instruisto. Sur murtabulo, kiun prizorgas la instruisto kune kun la gelernantoj, aperadis bildaj klarigoj de la gramatiko — povis ĝin vidi ĉiuj gelernantoj kaj krom tio ankaŭ la vitroŝrankon, en kiu estis ekspoziciataj Esperantlingvaj gazetoj, leteroj ktp. La rondeto havas apogon de la direktoro, la helpon de lia anstataŭanto. Ĝi estas oficialigita kiel libervola laborrondo. Jarfine la rondetanoj ricevis — sur la lernaj atestiloj — oficialan mencion pri la laboro en Esperanto-rondeto.

GOTTWALDOV

Esperanto-rondeto ĉe Unuiĝinta Uzina Klubo da naciaj entreprenoj Svit, Ruĝa Oktobro kaj ZPS ne estas multnombra, sed klopodas esti aktiva kaj utila al la Esperanta movado. En la urbo ĝi prizorgas 6 montrajn kestetojn, pere de kiuj ni informas la vastan publikon pri niaj novaĵoj. La anoj esperantigis la libron de Maruška Kudeříková „Zlomky života" (Fragmentoj de vivo). La junan, 22-jaran studentinon-komunistinon la faŝistoj ekzekutis per senkapigo. La lingvan kontrolon de la traduko kompleze faris D-ro Černý, konata samideano el Bohemio.

Laŭ la iniciato de francaj geesperantistoj el la urbo Romans, la rondeto — en la kadro de oficiala ĝemeliĝo de la urboj Romans kaj Gottwaldov, ni interfratiĝis kun la tiea esperantista grupo Bona Stelo, ekzistanta jam de la jaro 1910. Estas interŝanĝataj leteroj kaj sonbendoj. En majo ĉi-jara dum reciproka vizito de la francaj amikoj en Gottwaldov, la rondetanoj kaj la Klubo povis bonvenigi s-aninon Nanette Romanat.

(Laŭ letero de Jaroslav Hošek)

Esperantista Klubo ĉe Parko de Kulturo kaj Ripozo en Brno kunvenadas ĉiumarde de la 19-a hore en la nova klubejo: Šilingrovo náměstí n-ro 2, ŝtuparo C, etaĝo 1-a, pordo 2-3.

La kluba laboro ne estas aparte menciinda — ĝi estas memkomprenebla kaj entute kutima ĉe ĉiu bone funkcianta klubo. Tio estas: respondi ĉiujare kelkcent leterojn, prizorgadi bonnivelan programon por la kunvenoj, regule organizi kursojn, provizadi pli-malpli regule la preson per informoj pri la movado; varbi, varbadi ktp. Tamen ni diferencas, kiel ni opinias, de aliaj kluboj: ni konscias, ke bone labori signifas ankaŭ subteni la Esperanto-preson kaj literaturon. Tial ni ĉiujare dediĉas el la kluba budĝeto Kčs 2000 por gazetoj kaj libroj. Ni abonas 13 Esperanto-revuojn en 2-6 ekz. kaj unu ĉeĥan (ankaŭ en 2 ekz.) Same 2-10 librojn kaj pli de ĉiu libro, kiujn anoncas KNIHA en Prago. — El la pluaj aranĝoj de la klubo ni menci la koncertan vesperon okaze de la 50-a datreveno de D-ro L. L. Zamenhof. Ĉiujn ravis la perfekta arto de sopranistino Helena Supová-Halířová kaj de tenoristo Rostislav Chudoba, kiuj kantis ariojn, kantojn kaj duetojn plejparte en Esperantaj tradukoj, kun piano-akompano de Prof. Vilibald Scheiber, kiu jam ekde la jaro 1946 regule organizas la famajn kaj senkompare altnivelajn artismajn programojn por la klubo. Ni ne povas sufiĉe danki al s-ano profesoro pro la grandega laboro kaj liaj meritoj sur ĉi tiu kampo. — Plue ludis profesoroj violon-virtuozo Arnošt Jíra kaj pianisto Jaroslav Šháněl. Ĉi tiu duopo akiris jam la famon ne nur en nia enlanda muzika vivo, sed ankaŭ en eksterlando. Ilia ludo forte impresis la publikon pro la altega majstreco, ritma streĉo. — Oratoris J. Vondroušek. Partoprenis proksimume 80 personoj, anstataŭ kelkcent, kiel meritis la mirinda programo.

(Rim. de la red.: estas vere bedaŭrinda afero, ke la altvaloraj prezentadoj de la operkantistoj en Brno okazadas ĉiam nur — por tiel diri — inter kvar muroj kaj ne atingas la orelojn de la ekster-brnaj kaj eksterlandaj esperantistoj. Ĉu ne estus eble almenaŭ surbendigi ilin sur magnetofonojn kaj disponigi al la rondetoj?)

„Ĉeĥoslovaka Pacdefendanto" estas la nomo de la 3-folia cirkulero, kiun eldonis en Prago en aŭgusto 1967 Ĉs. Sekcio de Mondpaca Esperantista Movado kaj redaktis Tomáš Balda, sekretario de ĈSEK en Prago. Krom alvoko al ĉiuj pacaktivuloj ĝi asperigis la rezolucion de la Monda Konferenco pri Vjetnamio, ĝian Alvokon, la rezolucion de Ĉs. Komitato de Pacdefendantoj kaj ĝian Proklamon. Ĝi atentigas, ke rilate la Semajnon de Internacia Amikeco en junio 1968 oni sin turnu al Loka Organiza Komitato ZK ROH Škoda, Kopeckého sady 13, PLZEŇ.

BELARTA ALDONO

LITERATURA KONKURSO

de Esperantista Kultur-festivalo Opava 1967

La konkurso estis anoncita fare de la aranĝanto, Esperanto-rondeto de Uzina Klubo OSTROJ en Opava (Nordmoravia Regiono de ĈSSR). La dato de la anonco estis januaro 1967 kaj la limdato de la alsendo, la 30-a de aprilo 1967.

Estis anoncigitaj du konkursaj kategorioj, nome de poezio originala kaj tradukita, kun ebleco aljuĝi entute 3 premiojn en ambaŭ kategorioj.

Ĝis la limdato venis al la anoncinto laboraĵoj de 19 partoprenintoj, el kiuj unu prezentis tradukitan prozon, kiu ne konformis al la konkuraj kondiĉoj. 18 aŭtoroj prezentis versajn verkaĵojn, el kiuj estis 60 poemoj originalaj de 14 aŭtoroj en suma amplekso de 1261 versoj, kaj 6 aŭtoroj alsendis poemojn tradukitajn en suma nombro de 9 poemoj. Entute la ĵurio ricevis 69 laboraĵojn en suma amplekso de 1418 versoj, inter ili du kompletajn poeziajn ciklojn.

La faka ĵurio havis tri membrojn: Jiří Kořínek, Prof. Miloš Lukáš kaj D-ro Tomáš Punpr. Ili anonime kaj sendepende prijuĝis la alvenintajn verkaĵojn laŭ poentsistemo de 0 ĝis 20. Ĉe la poemoj, taksitaj per la plej alta poentnombro, estis postulita ankaŭ skriba pritakso, ev. motivigo. Siajn pritaksojn la ĵurianoj sendis al la konkurs-anoncinto, kiu konsidere al la unuopaj pritaksoj, faris la finan valortakson. Post tio estis malfermitaj la ĝis tiam fermitaj kovertoj kun la nomoj de la aŭtoroj kaj fiksita la finrezulta vico:

La 1-an premion kaj sumon da Kčs 300,— oni aljuĝas (konsiderante ankaŭ la altan nivelon de la ceteraj konkursaj kontribuaĵoj de la sama aŭtorino) al:

Eli Urbanová, Prago: Anstataŭ dormi . . .

La 2-an premion Kčs 200,— al

Karolo Pič, Litomyšl: Belis la homo . . .

La 3-an premion kaj Kčs 100,— al:

Inĝ. Karel Janouš, Ostrava: Adiaŭa soneto.

Plue, konsiderante la nivelon de la tuta poemaro, oni atribuas eksterordinaran premion al

Eli Urbanová, Prago, por la poemaro „Herooj de Zodiako”.

Krome la anoncinto aljuĝas laŭdajn menciojn al aŭtoroj:

Oldřich Vaněk, Šumperk: Kiso (J. Vrchlický),

Petro Poliščuk, Taškento, USSR: Plenplenas la kora ardo. Rememoro.

Josef Cink, Červená Voda: La sonoj de Maria.

Karolo Píĉ, Litomyšl: Aŭtuno.

Antonín Chrápavý, Ostrava: La dekdua meznokte.

Alena Novotná, Havlíčkův Brod: Ne plu. Kien forflugis la amo.

Konklude eblas diri, ke la relative granda partopreno de la esperantistaj aŭtoroj en la konkurso agrable surprizis la anoncintojn.

Simpatia estas ankaŭ la apero de novaj nomoj en la poezia sfero. Tamen necesas konstati, le iuj — ankaŭ laŭde menciitaj — poemoj kaj la plejparto de la pritakse nehonoritaj enhavis grandajn mankojn, ja eĉ fundamentajn gramatikajn erarojn (ekz. malkorektan elizion de akuzativoj; plurala, adjektiva, verba finaĵoj ktp.) Per tio iuj poemoj senigis sin je pli bona lokigo. Estas evidente, ke estus konvene prilabori koncizan fundamenton pri la poezia kreado en Esperanto.

Pri la premiitaj poemoj la anoncinto rezervas al si la rajton de uzo. Okaze de publikigo ili povas porti la signon de la literatura konkurso okaze de la EKF en Opava 1967.

En Opava, la 30-an de junio 1967
por la konkurs-anoncinto Inĝ. Vlastimil Kočvara

K. Gusev

AL PETRO BEZRUĈ

Al la homoj de fabriko, mino, ŝakto,
kies vivo havis guston de absinto,
via verso kiel rara nokta kaktus
ruĝe brilis en obskuro de l'pasinto.
En la versoj de severo kaj obstino,
al estanto redonataj per stafeto
al ni sonis nia sorto kaj destino,
kara Petro, nia frato kaj profeto.

Oni prenis vian kanton kiel armon
al la placo por kolono de batalo,
kaj timigas ĝia sono la ĝendarmon —
la gardanton en la regno de fatalo.
Vian kanton oni ĵetis trans la kradon,
sed ĝi ree traŝiriĝis al la strato
kaj standarde kronis nian kamaradon,
kara Petro, kaj profet' de ni kaj frato.

Jaro jaron ŝanĝis, vento sekvis venton,
sed la verso floras freŝa, nevelkanta
kaj ĝisvivis vi la finan, plenan venkon
de la sorĉa antaŭvido via kanta.
Kaj ekdormis vi feliĉa. Sed en Pteni,
en Ostrava via kant' potifonia

vin deziras poreterne viva teni,
kara Petro, kaj profet' kaj frato nia.

Komencante novan vivon kaj bonfaron
maljuniĝos kaj forvelkos pro nenio
vi — junulo, travivinta nur centjaron
el jarmiloj, destinataj al genio.
Kaj hodiaŭ via ruĝa floro rava
floras jam en nia rondo amikara,
kunveninte vin omaĝi en Opava,
nia frato kaj profeto, Petro kara.

En poemoj viaj spiras ĉiopovo
de la mondon referanta nobla mano.
Via vorto, sin turnanta al la novo,
por futuro iĝis pano kaj kompano.
Brilu flame via krono silezia
el la monda poezia bunta spektro,
mirigante per eterna gloro sia,
nia frato kaj profeto, kara Petro.

Unua premio

Eli Urbanová

ANSTATAŬ DORMI

Matene en la tramo,
sur strato, sed plej ofte
dum maldormado nokte
mi pensas pri la amo ...
Matene en la tramo,
sur strato...

Kaj ju pli da abrupto
mi aŭdas dissplitiĝi,
des pli mi pensas pri ĝi . . .
Pri amo, ne volupto . . .
Kaj ju pli da abrupto
mi aŭdas . . .

Kaj urbo apatie
mienas jen kaj homoj
parolas nur pri mono ...

Mi pensas pri ĝi ... Tiel ...
Kaj urbo apatie
mienas...

Pri amo, kiu ligi
nin ŝajnas plu, pri tiu ...
Kaj mi ĝojegas, sciu,
kaj povus min mortigi...
Pri amo, kiu ligi
nin ŝajnas...

Eli Urbanová

AL

LA

LEGANTO

Min ne riproĉu, ho, legant',
ke pekis mi kontraŭ la moro;
mi nur malkaŝis en la kant'
kapricojn de l'Amoro!

Mi pekis, jes — en fantazi',
dum restis mi en viv' asketo.
Jen kiel stranga profesii'
donita estis al poeto!

Dua premio

Karolo P í ĉ

BELIS LA HOMO

Ekzistas nur unu sola perspektivo:
la tombo.
Kaj tiusence
eĉ la Orharulina kombo
celis nenion alian.
Eviti la peston azian . . .
Ĉiu progreso
estas nur anatemo,
regreso,
diabla semo

kaj milo da rodantaj vermoj.

Cetere por la Naturo
la vermoj
ne valoras pli ol spermoj.
La speco antropo
ne estas eterna.

Kaj tial la homo
(ideo konsterna!)
neniam tuŝos la pilastrojn
de la universo,
nek atingos fremdajn astrojn,
ĉar dume ne plu estos homo!

La paradiza porno ...
Ne, ĝi ne estas temo
legenda,
tamen ankaŭ ne anatemo,
sed parabolo
kaj antaŭdiro!
Jam en ĝi troviĝis vermo
kaj deliro
(ankoraŭ unufoje junece eferveski!)
Sed eĉ hedero
ne kapablas pli ol kreski!

Post somero
venos vintro
(ĉiam la sama:
mi amas vin tro!).

Kaj ekzistas
ankoraŭ unu
netranspaŝebla limo:
la tempo
kaj la daŭro.
Volu, ke vi ĉiam nunu,
ke floru la flaŭro,
ke ĉiam estu printempo!
Sed ĝuste tial mi ne kredas
al la kosmaj fabeloj!
La Ejnŝtejnaj relativaĵoj
estas maskobalo.
Kaj nur la trubaduraj hederoj

estas realo!

La deksepa jarcento

ekzistis.

Sed estos nenia sepdeka jarcento!

Ĉar tiam

en ĉi tiu parto de la universo

jam blovos tute alia vento.

Neĝos.

Kaj oni kalkulos

laŭ tute aliaj ekvacioj

kaj laŭ alia matematiko.

Epoko de la

(jam kioma?)

Nova Paleozoiko!

Venos alia heroo.

Komenciĝos la historio

de tute nova

Protozoo.

Kaj tial

ĉiuj mondaj problemoj

min eĉ ne ĝenas!

Mi ne havas tempon.

Ankaŭ la homaro ne havas tempon.

Sed ĝi ne scias tion.

Ĝi ne konscias sian agonion.

Aŭtuno venas.

Kaj tiom pli

mi volas printempon!

Rapide!

Rozojn, brakumojn, kisojn,

belajn virinojn!

Avide!

Ankoraŭ kelkajn rendevuojn

meteore!

Ankoraŭ kelkajn ĝojojn kaj ĝuojn

honore

al la Amebo,

kiu anstataŭos min!

Ĉar, ve, tamen . . .

Belis la homo . . .

Belis la virin' . . .!

Tria premio

Inĝ. Karlo Janouš

ADIAŬA SONETO

(Al morto de Julio Baghy)

Nur rememor' silenta plor'
postrestis, kiam iris for
hom' de karaktera gesto,
poeto de la nobla kor'.
Por eterna malĉeesto.

Ĉu en elrabita nesto
denove kreskos verda flor'?
Eksilentis leterkesto,
en kiu pulsobatis mond'.
Disfalis la spirita mont',
orfiĝis verko — sankta font'.

Ho, fratoj de la homa gildo,
heroo kuŝas sur la ŝildo,
Ho, fratoj de la homa gildo,
lin honorigu nia front'!

J. Svoboda:

ENKONDUKAJ VORTOJ AI LA FESTIVALAJ EKSPOZICIOJ

(mallongigite)

La ampleksa verkaro de Martin B e n k a , akademia pentristo kaj nacia artisto, havas fundamentan signifon por la evoluo de la slovaka pentroarto. Benka, kiel artisme forta individuo baldaŭ atingis propran, specifan esprimon, ekspresivan, monumente konceptitan, tre impresan kaj ravan. En liaj konvinkaj sintezaj komponaĵoj revivis post la jaro 1918 jam Slovakio libera, plena de laborelano kaj strebo al sinvalorigo, Slovakio plena de emo al la nova vivo, Slovakio de laborema popolo el la montaraj valoj, de la riveroj, sed ankaŭ konservantala popolkostumojn kaj kutimojn.

La esprimkapablo de Martin Banka estas impresplena ne nur por liaj

samlاندanoj, sed ankaŭ por la publiko ĉeĥa, ja eĉ por la tutmonda. Pri tio pruvas la sukcesoj de lia verkaro ankaŭ en internaciaj forumoj, ĉar ĝi elkreskis el profunda amo al la hejma medio kaj el la internaj radikoj de nia enlanda artisma tradicio. Kaj ĝuste en tio Benka estas proksima al Petro Bezruč. El ĉiu linio, peniktuŝo, kolortono de lia paletro alparolas nin lia intima kunvivado kun la hejmlando; el ĉiu verko radias lia entuziasmo por la belaĵoj de la patrujo kaj lia amplena rilato al la vivosorto de la slovakaj popolo.

Ankoraŭ antaŭ la I-a mondmilito, Benka kiel disĉiplo de la privata skolo de Kalvoda, ekstaris apud la moravia-slovaka rondo de belartistoj, en kiu gravan rolon ludis la fratoj Úprka, precipe Joža. Kiel membro de la Asocio de la moraviaj belartistoj en Hodonín baldaŭ li trovis la bazon por sia plua evoluo. Li forlasis la tiutempe modan impresionismon kaj anstataŭ la eksteraj bildigo de la impresoj kaj atmosfero de la naturo, li iris ĉiam pli profunden al la enhavo de la bildokrea esprimo. Li atingis mallongigon, sinteze tre kompaktan, scianta en ekspresionisma potenco kaj monumenteco diri ĉion, kion la sentemaj koro kaj okuloj de la artisto ekkonis, travivis kaj trapensis en la rilato al la nova realo, kiun Slovakio enpaŝis post la unua mondmilito.

Lia verkaro en sia komplekso vere aspektas kiel eksplodo de artista forto, nome la slovakaj artistoj, kiu per lia talento estis liberigita kaj poste vastiĝis en larĝan fluon fekundiganta la pli junajn generaciojn kaj sugesto-riĉe influanta ankoraŭ nun. La verkaro de Martin Benka same kiel la poezia verkaro de Petro Bezruč fariĝis havaĵo de la plej vastaj popol-tavoloj en ambaŭ niaj nacioj.

Specimenoj el la verkaro de Vincenc Havel, kiu jam de jaroj laboras en la Ostrava-regiono, prezentas al ni artiston, de kiu la sentema analiza arto de observanto kaj kapablo: bildigi trafte la psikologian karakteron, estas ligita kun la sento por monumenteco de la materio, kiun li konsidereme taksas ne nur el la vidpunkto plastikeca, sed ankaŭ arĥitektura. Tion dokumentas aro da monumentaj verkoj de Havel, dissemataj tra diversaj lokoj de la regiono. Al ili apartenas ankaŭ grupo da tomboŝtonoj kaj plastikaj dekoracioj de publikaj konstruaĵoj. Al liaj elstaraj komponaĵoj apartenas ankaŭ portretoj.

Havel kiel disĉiplo de Mařatka, jam de la komenco de sia artisma agado estis forte ravata de la motivo de la virino. De trafikaj infan- kaj knabin-portretoj estis nur paŝeto al la skulptista reproduktado de la graciaj korpolinioj knabinaj kaj virinaj. Por la skulptisto la virino fariĝas certa nocio, ideo. La skulptisto poezie reverkas la realaĵon en mole lirikajn formojn, kiuj nin ravas per sia neta plastikeco. La statuoj de Havel ne estas prezentataj en malvarmaj, teatrecaj pozoj. Ili ĉiuj vivas per movo kaj tremas per la vereco de la vivo. El la verkoj de Havel ni sentas, ke la krea laboro estas por li vera fonto de krea ĝojo; la kreadon li konceptas kiel seriozan meditadon kaj surbaze de interesplena observado kaj respondeca realigado de la interna vereco de la vivo-fenomenoj.

LA GRANDA MISKOMPRENO

En la unua numero 1967 de nia bulteno „Zprávy” poeto Karolo Pič ekfervoris kontraŭ la neologismoj kaj la „frennezaj poetoj“. Se mi estus plurloke aŭ nur unuloke leginta poemon, kiel de li liverita monstro KOKLIKOTO, en kiu svarmas elpensitaj vortoj (solejlo, ruberi, frohi, ruheni, solituda, enherce ktp.), mi kaptus lancon kaj hastus ekbatali flanke de nia indignanta poeto. Sed ĉar mi nenion similan en nia literaturo trovadas, ŝajnas al mi, ke tio estas iom donkiĥota lukto kontraŭ ventaj mueliloj. Kaj ke en tiu batalkrio iom subaŭdeblas falsa sono. Kaj ke pluraj ŝerckomparoj tute ne taŭgas, kiel tiu pri silko kaj nilono, pri moderna artefarita fibro kaj la klasika malsinteza (tio estas eĉ iom mia fako). Mi opinias, ke facilanimaj sputantoj de arbitre kaj senbezone altirataj neologismoj, ĉesas inter seriozaj verkantoj aperadi. Tiaj ja estas same malutilaj por la sane evoluanta lingvo, kiel vortaristaj absurdaĵoj, kiujn mi baptis azorinaĵoj; kiel danĝeraj lingvaj maldisciplinaĵoj de la „ataistoj”, kiel enkondukado de lingvaj eksplicitaj eraroj de iuj aŭtoroj de literaturaĵoj, de lernolibroj, de gazetredaktoroj Sed mi volas oponi alian aferon, kiu povus esti miskomprenata el la vortoj de Karolo Pič.

Nome, li uzas la belajn kaj spritajn versojn de Kolomano Kalocsay el la Parnasa Gvidlibro por argumenti, ke Esperanto ne bezonas la ornamajn poeziajn sinonimojn, ke por ĝia poezio, la sole bona kaj valora, sufiĉu la fundamenta oficiala vortprovizo. Sed ja estis ĝuste niaj plej granda poeto kaj liaj disĉiploj en la Budapeŝta kaj skota skoloj, kiuj porbatalis la riĉigon de nia vortaro per novaj sinonimoj kaj preskaŭsinonimoj; per vico da kurtaj, trafaj apudesprimoj por la nocioj plej vaste uzataj, kie ja ankaŭ la naciaj lingvoj ofte havas riĉan elekton en sinonimoj fajne nuanceblaj. Dank' al la Kalocsaya avangardeco hejmiĝis jam la plejparto de la neologismoj el la Parnasa Gvidlibro en la moderna Esperanto. Esprimoj kiel kurta, dura, pigra, olda, pado, povra, lanta ktp. jam tute ne sentiĝas kiel balastaj sinonimoj, sed male, pro sia praktikeco kaj taŭgeco ili ne nur pliriĉigis la poezian esprimpaletron kaj rimaron, sed ili jam transiris eĉ en la praktikan kaj fakan lingvon (kurtonda stacio, durmetalo ktp). Kiam oni verkas aŭ poetas en originalo, oni povas frizi la versojn laŭ sia propra gusto kaj kaprico, oni povas insisti pri tio, ke oni evitu ĉiun elizion kaj apostrofon (vidu la ekstremulon Brendon Clark); oni povas rezigni pri ĉiuj neologismoj de post la jaro 1925 (la plejparton el ili oni hodiaŭ jam apenaŭ rajtus nomi neologismoj), oni povus akcepti ankoraŭ aliajn limigojn, kiel ekskludi verbigon de adjektivoj ktp. Tion oni certe darfas, eĉ kiam la kontraŭulo de tiaj absurdaj ekstremaĵoj povus tiajn principojn refuti per asertoj, ke ekz. la apostrofo kaj elizio estas nepra kaj vivnecesa propraĵo de Esperanto, ĝia genia kaj granda pluso, kian cetere posedas la ĉefaj naciaj lingvoj (angla, franca, itala k. a.); oni povus demonstri ke la novtempa evoluo de moderna lingvo evitas kolbaslongajn kunmetaĵojn kaj serĉas sintezon de vidpunktoj estetika kaj praktika; ĝi trovas celtaŭgaj vortojn kiel hasti, hurti ktp.; ĝi inklinas ŝpari tempon kaj vortojn anstataŭigante ekz. frazon „li veturis per la aŭtomobilo al Brno” per „li aŭtis al Brno” k. s. Ĉi tien apartenus la pravigoj de multaj neologismoj komence uzitaj en la poezia fakvortaro”; de verbigoj

de substantivoj kaj adjektivoj kun sia dinamisma esprimivo kaj elvokivo. Sed eĉ la ornamaj poeziaj vortoj de la tipo „primavero“, sinonimoj ŝajne eksmodaj, havas siajn rajtigojn. Ankaŭ la ĉeĥa lingvo ne kondamnis tiajn „vesna, jeseň“ k. s., sed rezervas ilin por certa koloreco de la klasika poezio kun ties patosemo kaj girlandaj esprimoj. Tiaj vortoj havas ankaŭ plene funkciajn lokojn en Esperantaj vortaroj kaj en tiuj nun eksmodaj poeziaj formoj. Ilia ekzistado ne senrajtigas eĉ la fakto, ke la moderna poezio sin esprimas laŭeble civile, per simpla lingvaĵo, flua kaj ĉiutaga, rezignante ofte pri la klasika verso, ritmo kaj rimoj, kaj kapablas per forto de sia artisma vereco, ideo freŝeco kaj plensangaj poeziaj metaforoj eldiri la maksimumon.

Sed la plenan valoron de la pliriĉigaj sinonimoj kaj nuancvortoj, kiujn liveris la Parnaso Gvidlibro (ne ĉiujn!) kaj de pluraj taŭgaj neologismoj; de la posedo de elizio; de verbigeblo de adjektivoj kaj substantivoj, iam de prepozicioj, oni devas agnoski ĉe la traduka laboro! Ĉe tradukado de poezio kaj muzikaj tekstoj (operoj ks.) oni ne povas rezigni kaj neglekti tiujn gravajn, bonvenajn kaj aprezendajn rimedojn de adekvata esprimivo. Sen ili devus tiu laboro ofte, tre ofte fiaski eĉ ĉe kapabla, inventema verkisto. Tio do ne estas oportuno kaj pigreco de la verkisto kaj tradukisto, sed absoluta neceso. Pigreco kaj arbitra, facilanima nedisciplinaĵo estas, kiam la verkisto pro malpenemo kreas nenecesan novan vorton por jam ekzistanta nocio (vidu kobajo-kavio, klefo-kleo ks.) aŭ kiam li abortas pro nescio facilanime sinonimon nebezanan, ofte malplaĉan kaj superfluan (friŝtiko, kindergartenoj, ktp). Ĉe pli da kunlaboro kaj eble ankaŭ ĝustatempa interveno de la Akademio oni povus eviti la troabundigon de sinonimoj. Por la iom longa kvarsilaba vorto „malproksima“ sentiĝis bezono de mallonga sinonimo. Nu kaj naskiĝis tuj vico da ili fora, dista, lontana (eĉ f e r n a mi ie legis). Sufiĉus unu el ili! „Fora“ ja ne estas plej feliĉa, kvankam plej multe uzata, ĉar en la prefiksiĝo ĝi ofte havas alian signifon ol malproksimen (foriri, forfalis, forbrulis).

Cetero tre ofte la malpenemo kaj nelernemo de la „Samideanoj“ estas la kaŭzo de malŝato al proprigo de pli riĉa vortprovizo, al lernado de novaj vortoj kaj sinonimoj. Poezio, ĉiu vorto kaj ankaŭ la vorto enkondukita en la lastaj tridek kvin jaroj kaj proskripciata kiel dama neologismo havas sian plenan forton kaj elvokivon, kiam ĝi estas daŭre abunde uzata kaj praktikata. Tial ankaŭ ĉiuj vortoj kun prefikso mal- havas sian plenan elvokivon, kiam ili estas konstante kaj multe uzataj kaj transiras en nian subkonscion. Same kiel en la ĉeĥa „nepřítel“, „nehezky“ ĉe ekaŭdo ne trapasas ian analizon en nia menso, kiu bremsus la rapidan elvokivon de la nocio, same ĉe ofta uzo la vortoj „malamik“, „malfermi“, „malkonciza“ ktp. elvokas tuj sen kia ajn analizado la difinitan nocion, kaj same ĉiu „mal“ —vorto ofte uzita. Tial la mal-vortoj amike vivu apud la kurtaj eventualaj sinonimoj. Kaj al tiuj, kiuj sin ankaŭ nomas esperantistoj kaj volas kontentiĝi kun laŭeble magra vortprovizo necesa por ilia poŝtmarkinterŝanĝo kaj senpretenda korespondado, povas vere ankaŭ tia primitiva kelkcentradika Esperanto bone servi. Moderna poeto klopodos sin esprimadi ankaŭ per lingvaĵo senvola, sed riĉecon pretendos lia verko ankaŭ. Kaj oni devas tre hejmiĝi en la lingvo, kiam oni volas digesti eĉ la labirintaĵojn de la poezio superrealisma, abstrakta ktp.

En plua punkto mi devas malsamopinii kun Karolo Piĉ. Li asertas, ke por li ne havas valoron verkoj tradukitaj en Esperanton, ke li tiajn eĉ ne legas. Ĉi tie mi devas

objeti, ke en la tradukoj ĉu de prozo, ĉu de poezio, submetiĝas la lingvo al la plej rigoraj ekzameniĝoj. El mia praktiko mi scias, ke estas ofte pli malfacile fari bonan tradukon de poezia verko, de muzika teksto, ol verki originale. Kaj sen tradukoj el la monda literaturo, kiom da literaturaj artverkoj ni havus? Tre malmultajn. Ĉar kompreneble la gigantoj de la literatura arto povas laŭprobablece multe pli ofte aperadi en la grandaj naciaj lingvoj kun dekmilionoj aŭ centoj da milionoj da plimalpli kleraj lingvouzantoj, ol inter dekmiloj da pli-malpli lingvokapablaj esperantistoj. Tial la tradukita verko havas en la Esperanta literaturo egalan gravecon kaj valoron kiel la originala. Tiun ĉi agnoskon konstatis same Milan Kundera dum la antaŭnelonga Kongreso de Ĉeĥoslovakaj Verkistoj kaj oni ĝin denove emfazis en la pasintaj tagoj en gazetoj kaj radio. La grandan meriton, taskon kaj valoron de la artplena traduklaboro por ĉiulingva literaturo oni ne povas ne vidi kaj ankaŭ por la ĉeĥa lingvo, kiu disponas pri nekompareble pli multaj verkistaj talentoj ol Esperanto, ĝi estas rekonata kaj oni tion diris eksplicite, ke la lingvon perfektigadis kaj evoluigadis bonaj tradukverkoj, plej unue de la Biblio.

Traduko de poezio, eĉ la optimale bona, estas ĉiam kompromiso. Sed se mi volus legi nur originalojn, mi kapablus krom la ĉeĥajn, Esperantajn kaj germanajn neniujn aliajn ĝui, ĉar mia angla estas tro malsufiĉa kaj pri la ceteraj lingvoj mi devus tute rezigni. Kaj tio estus nepardonebla eraro. Tial mi legas kun plena ĝuo bonajn tradukojn en la ĉeĥan kaj en Esperanton. Jes, ankaŭ mi ŝatas verki originale. Sed kiam mi aŭdas iun subtaksi la perfektan traduklaboron, elmergiĝas en mia menso la neforgeseblaj belaj versoj de fama tradukanto en la ĉeĥan lingvon, Otokar Fischer, kiujn li skribis post la fintraduko de Faŭsto de Goethe en la ĉeĥan kaj kiujn mi ĉi tie nur pale provas redoni:

„Mi kun laboro pretas, kiu ne estas mia,
mi pretas kun laboro ja pli ol mia nur,
sekretojn du ĝi portas kaj mem pri io tria
per nova enkorpiĝo konfesas al okul',
super nacio stare, ĝi kvazaŭ ring' lumstria
brakumas la kontrastojn en hela ĉirkaŭkur'.

Ĉiam pli granda, fremda, estis mirinda ringo,
ĝis kernon mi ekkonis: miraklon de la lingvo.
Gvidantoj du tra l' krutoj kaj tra la nokt-obskuroj
min ŝirmis en danĝero de renversiĝ' aŭ fal'.
Kun unu mi jubilas: Beataj vi okuloj!
kaj flustras kun la dua: Dankojn kun malavar'!
La tria voĉo malgraŭ de l' mond' envi', ululoj,
min helpis traluktiĝi al orda regular':
mergita esti lume en geniula forto
kaj kun genio scii: Komence estis vorto.

Kaj estos ĉe la fino! Ĉar en la vorta povo
renaska belo kuŝas, kiun posedas temp'.

Mi pretas kun laboro, nepretan ĉiam trovos
ĝin foje aliies traduka kompetent',
kiam — rejuniĝanta kaj en eterna novo —
lingvo invitos iun el ni al sama tem'.
Ni ekbruligas fajrojn flagrontajn enmontare
por al venontaj fratoj bruli invitofare.“

Eli Urbanová

ALUDO

Senkulpaj estas miaj manoj
kaj mia korp' entute.
Al epizodoj kaj romanoj
mi nur rigardis mute.

Do tial trovas mi en ordo
aludon de spegulo,
ke blankaj estas manoj, korpo,
sed nigra la okulo.

Reĝin'sen trono

Reĝin' vi estas.
Eĉ sen trono.
Vi simple regas
per rigardo.
Jam en momento
de l'ekkono
min polven pelis
kruda ardo.

Reĝin' vi estas.
Voĉkoloro
fide perfidas
fakton tiun.
Ja kial volus
mia koro
nur vin obei
kaj neniun?

Reĝin' vi estas.
Ĉiopova.
Sufiĉas sekvi
vian geston.

Pro vi mi iĝas
homo nova,
pro vi mi ŝanĝas
min en beston.
Reĝin' vi estas.

FINO DE HETAJRO

Flirtpromenante tra l'salono
ĉiun ŝi tuŝis, ĉiun ridis,
nur unu, unu ŝi ne vidis,
ĉar li restadis en la fono.

La rondon iam ŝi forlasis.
Dio! Venkita absolute
ŝi lin rigardis mire, mute . . .
Kio kun ŝi, hetajr', okazis?

Ŝi sentis ĝuon tre ekscitan:
Jen vir', al kiu kor' ŝin ligas!
Jen viro, kiu personigas
ŝian heroon prirevitan!

De tiam ŝi nur unu vidis.

Jiří Kořínek

Etoso aŭtuna

En vento klinas sin herbtigoj
kiel nukar' de funebrantoj,
kiel mesaĝ' de trist-sciigoj
folioj kuŝas ĉe vojrandoj.

En grizon la dimanĉ' sin vestis
kaj arboj farbis sin oktobre
kaj inter flav' kaj bruno restis]a lastaj floroj beli sobre.
Aŭtuno venas ja laŭdeve
en ta natur' kaj homa vivo:
la sunsezon' forŝvebas meve,
junecon prenas tempodrivo.

Revene mi tra kampo iras.
Al parabolo pens' kondukas:
ni al ambos' kaj grund' similas,

viv' nin martelas, sorto plugas.

Jiří Kořínek

SUNA TAGO OKTOBRA

Post pluve plora tag' subite,
kvazaŭ kaprice, kvazaŭ spite,
per malavara granda gesto
en sia plej impona vesto
natur' aŭtuna sune ekradius.

Sur bluĉielo nubĉifonoj,
sub buntkoloraj arbaj kronoj
surtere miloj disŝutiĝe,
oro kaj kupro kuŝas riĉe
kaj super ĉio ar' kornika krias.

El la aero pure klara
paradas bunto foliara,
la majstra mano de l' aŭtuno
per la peniko de la suno
fabelon ravan sorĉe pentri scias.

Aleksandro Petófi

FINO DE SEPTEMBRO

Jen, floras ankoraŭ la floroj en valo,
jen, verdas ankoraŭ la poploj ĉe l'font',
sed vidu, jam tie la vintra vualo,
la neĝo ekkovris la supron de l'mont'.
En kor' mia juna kun flamaj radioj
printempe brilegas ankoraŭ la sun',
sed griza jam iĝis ĉe miaj tempioj
la nigra hararo per prujn' de l'aŭtun'.

La floro defalas, la vivo forpaŝas..
Ho, venu al sino, edzín', mia am'!
Vi nun la vizaĝon sur Brust' mia kaŝas
kaj morgaŭ — ja eble sur tomb' mia jam.
Ho, diru, se l'morto antaŭe min
prenos, ĉu por vi mi restos eterna nemor',
aŭ am' de junulo vin iam katenos
kaj nomon, la mian, faligos vi for?

Ho, se vi forĵetos la vidvinvalon,
ĉe l'tomb' ĝin pendigu je flag' de dolor'.
Kaj por ĝi mi venos kaj ĝin en la valon
de l'morto mi portos en meza nokt-hor'
por viŝi la vangojn, malsekajn de l'ploro
pri via facile-forgesa anim'
kaj vindi la vundon kruelan de l'koro
amonta eĉ tiam, eĉ tie, sen lim'.

Trad. Kolomano Kalocsay

Ho Ĉi Min

TAGKAJERO EN PRIZONO

Vespera ario

La roz' sin malvolvas kaj la roz'
ekvelkas, tion nesciante, kion roti
jam faras. Sufiĉas la roza parfumo.
Vagadu en maliberejon sen lumo
por ĉiujn maljustojn hurligi en la kor'
de ĉiu ĉenito sopira al rozflor'

La edzino de kompano venas lin viziti (*)

Li, malantaŭ
la ferkrado, ŝi antaŭ -
tre proksimaj . . . je nura fingretendo.
Sed tre foraj . . . la tero de l'ĉielo.
Kion la buŝo devas gardi en silento
tion l'okuloj ŝovas tra l' malhelo.
Kaj antaŭ ŝpruc' de ĉiu vort'
Torentas larmoj en agord'.
Ve, la sort . . .

*) ni represas la poemeton, ĉar pasintfoje elfalis du versoj. Ni petas pardonon.

ZPRÁVY ČESKOSLOVENSKÉHO ESPERANTSKÉHO VÝBORU — INFORMOJ DE
ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO - KOMITATO. — Vydává — Eldonas: Osvětový ústav v Praze,
Blanická 4, Praha 2, Rediguje — Redaktas: Dr. L. Izák — s redakčním výborem — kun la redakta
komitato: J. Cíhová, Ing. Ed. Felix, Zd. Hršel. O. Kníchal, M. Lukáš, Dr. T. Pumpr, Ing. Fr. Sviták,
Ed. V. Tvarožek, J. Vondroušek. Tisk — Preso: Tlačiarne Slov. nár. povstania, Martin RM/39 — 67/
KS NVP V-15*71530.